

„Ekde li estis tie ĉi la lastan fojon.“

„Ĉu tiun longan, longan tempon? Ĉu ĉiun tagon? Kvankam li ne plu povis reveni, ĉu? Kvankam li ne plu vivis, ĉu?“

Li softe skuis la kapon, ridetis same softe kaj respondis:

„Li ĉiam diris, ke ne estas morto; tion asertis al li lia frato Old Shatterhand. Kaj mi kredis al ili ambaŭ. Mi kredas tion ankoraŭ hodiaŭ.“

Per la mano li frotetis la ledan vestaĵon, kiu pendis tie de la muro, kaj pluis:

„Tiun ĉi *leggings*:on kaj tiun ĉi jakon li ĉiam surmetis, kiam li havis la intencon forlasi la loĝejon. Kiam mi estas sole tie ĉi, estas al mi, kvazaŭ mi aŭdus soneti la faldajojn de tiuj vestaĵoj. Ĉu tio estis Winnetou? Ĉu li pasis nevideble malantaŭ mi? Kiam mi enpaŝas tie ĉi, ofte estas al mi, kvazaŭ li starus tie ekstere sur la balkono, la manoj faldite pro preĝi; kion li kutime faris, kiam sopiro aŭ sufero tuŝis lian koron. Li nomis min sia amiko; sed mi estis fiere pri tio, ke mi rajtis nomi min lia servisto. Mi metis miajn manojn sub liajn piedojn, kaj ŝate estus ekmortinta mil fojojn pro li. Sed li devis ekmorti. Ĉar ne lia vivo, sed lia ekmorto ektimigis ĉiujn tribojn de la apaĉoj kaj ĉiujn ruĝajn popolojn, ni finfine malfermis la okulojn kaj komprenis, kiel valora estas la vivo de sola homo, ju kiom pli valora kaj nekompensebla do estas la vivo de tuta nacio, de tuta raso! Ni estis blindaj. Ni nun estiĝis vidantaj. Kiel mi amis lin, kiel mi amis, kiel senlime mi amis lin!“

Kaj subite li staris antaŭ mi, ekprenis mian manon kaj petis:

„Anstataŭu lin! Anstataŭu lin! Ne nur tie ĉi en la domo, sed ankaŭ tie ĉi ĉe mi!“

Li frapis sur sian bruston. Tiam li ankaŭ ekprenis la manon de la Koretinjo kaj pluis:

„Kaj vin mi petegas: estu al ni Nŝo-tŝi! Parolu al la virinoj, kiuj volas kuniĝi tie ĉi! Ne igu ili paroladi, sed ekagi! Tatela-sata estas religiisto, sed ne militisto. Pripensu tion bone! Tial estis la sopiro de nia eminenta Winnetou konduki sian fraton en tiun ĉi domon. La animo, kiu vekigis tie ĉi bezonas savon kaj ŝirmon antaŭ sia propra popolo. Ĝi esperas pri vi, pri vi!“ —

EN LA KAVO

La Mount Winnetou situas en la sudorienta angulo inter Arizona kaj New Mexico. La tieaj liberaj indianoj agnoskas neniun regadon super ili. La „Komitato por la Monumento de Winnetou“ estis estinta tiel ruze turniĝi al la kongreso de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kaj ricevis la permeson „establi urbon ĉe la Mount Winnetou, nomata Winnetou, kaj starigi pro la eksa ĉefo de la apaĉoj monumento de laŭplaĉa grandeco kaj laŭplaĉa vasteco, kaj fari ĉiujn pretigojn kaj ĉiujn konstruaĵojn, kiuj necesas pro tiu laŭdinda celo“. Tiel tekstis la permeso, kiun la rajtigita deligito estis farita al ili.

Post tio ili estis komencintaj ilian verkon, sen zorgi pri la tradicioj kaj rajtoj de aliaj. La triboj de la apaĉoj estis facile konsentigitaj, ĉar laŭdire temis pri ilia karulo Winnetou. Ankaŭ kelkaj komanĉaj triboj kune, ĉar Apanatŝka ja estis la ĉefo de la pohonimo-

komanĉoj. Unu ĉefo, laŭ kies opinio ĉiuj triboj de la apaĉoj agis, ne plu ekzistis post Winnetou, kaj kion rilatis la maljunan Tatela-sata:n, kies enfluo efikiĝis al ĉiuj ruĝaj triboj, li ne povis esti konvinkata akcepti la projekton, sed Old Surehand kaj Apanatŝka pensis, ke ili iam sed jes sukcesus aliancigi lin. Ili kalkulis je tio pri la devigo de la faktoj, kiuj estas nerezistebla, kaj do komencis kreadi kaj konstruadi sen atentigi pri liaj protestoj. Ajn ĉiu el liaj kontraŭoj estis malakceptataj per la fakte tre vera aserto, ke oni havis la permeson de la kongreso kaj ne respektis pli altan aŭtoritaton. Old Surehand kaj Apanatŝka ne plu estis la indianoj kaj okcidentuloj, kiel mi ekkonis ilin eksatempe. Per ilia riĉeco kaj vaste disigataj komercaj rilatoj ili kreskiĝis fore el iliaj antaŭaj opinioj kaj cirkonstancoj. Interne ili jam delonge ne plu apartenis al la ruĝuloj, sed al la blankuloj. Pro tio, ke la indiano ĉiumomente pretas ekmorti pro sia koloro, ili perdis la komprenon. Ili volis fari ‚komercaĵon‘ per ilia projekto, kaj ili volis levi iliajn filojn al famuloj, per kiuj poste ĉiam denovaj riĉecoj estis ĉerpeblaj.

Sed Tatela-sata ne estis la viro, kiu tiel simple rezignis pri tio, kion li pensis esti prave, kiel ili pensis. Li unue cedis antaŭ la devigo, sed nur ŝajne. Li ne povis eviti, ke ili katenis la akvofalon en elektrajn dratojn, ke ili malsanktigis la arbaron per ŝtonminejoj, kaj ke ili altiris amason da ruĝaj laboristoj, kiuj tute certe ne estus donintaj sin pro tio, se ili ne estus estintaj de iliaj triboj forpuŝitaj fiuloj. Sed li sendis mesaĝojn al la meskaleroj, la Lajaneroj, la Ĥikarijoj, la Tarakonoj, la navaĥoj, la Ĉirikavoj, la Pinalenjoj, la Kohoteroj, la Ĥiloj, la Lipansoj, la Mimbrenjoj kaj la Kupromin-indianoj. Tiuj ĉiuj estas apaĉaj triboj, kiuj honoris la ‚Tenanton de la Granda Medicino‘ kiel la plej eminentan viron de ilia tuta raso.

Li lasis iliajn ĉefojn veni. Li interparolis kun ili. Li klarigis al ili, ke tie ĉi rilatis malpli al honorigo de ilia Winnetou, sed plie pri honorigo de Young Shurehand kaj Young Apanatŝka, kaj ĝenerale al tute kutima komercaĵo. Li eĉ sukcesis klarigi al ili, ke estis pekiĝo al Winnetou, la en ĉiu rilato modesta, levi lin sur tiel laŭte elkrianta piedestalon. Li pruvis al ili, ke tio ne prokrastis la pereon de ilia popolo, sed povis nur rapidigi ĝin, ĉar ĝi instigis la aliajn tribojn nur al envio kontraŭ la apaĉoj. Koncize, li efikigis frapan sukceson ĉe la ĉefoj, kaj resendis ilin al iliaj anoj, pro ke nun tiuj efikiĝu al tiuj. La klano de la ‚Winnetou:oj‘ jam estis fondita; tiu kunefikiĝis. La faktan, malkaŝan agon kontraŭ la urba kaj monumenta komitato Tatela-sata prokrastis ĝis la tempo de la grandaj *meeting*:oj, kiuj devis esti farataj ĉe la Mount Winnetou. Tiu tempo nun preskaŭ tieis. Li unue volis antaŭpalpumi. Li devis scii, kiu el la ĉefoj estis pro kaj kiu estis kontraŭ lia plano. Sed ĝis nun li ne estis montrinta sin al neniu. Li estis restinta kaŝiĝinte en sia ‚kastelo‘, kaj malsuprenvenis hodiaŭ nur la unuan fojon ekde longa tempo, pro konduki min supren al si.

Tion li rakontis al ni dum la manĝado, al kiu li estis invitinta nin. Dum tio ja ne ekideis al li plendi pri tiuj disputendaj aĵoj. Lia vido estis akra kaj longdistanca. Li ekkonis tute certe, ke estis preskaŭ sole lia tasko ŝanĝigi la nunajn cirkonstancojn al bazo de nova, esperoplena estonteco. Tiaspeca kunfluigo de ĉiuj specoj de indianoj kiel nun ja ne ekspekteblis denove dum jarcentoj, tute aparte de la fakto, ke tiu raso ĝenerale devis pereji, se nun ne sukcesus blovi en ĝin novan, internan vivecon. Tial li estis fikse

decidiĝinta ekuzi tiun ŝancon kaj krei vastan vojon al la vekiganta animo de lia raso. La ecoj, kiuj necesis pro tio, li certe ĉiujn posedis, escepte de unu sola. Mi parolas pri la inciativa malkaŝeco, la agresema honesteco. Tiun la indiano ne posedas. Li posedis ĝin, certe; sed ĝi perdiĝis de li dum la interago kun la neniam promesplenumigaj palvizaĝoj. Li estis devigita retenigi sin al la kaŝata ruzaĵo, kaj tio fine estiĝis lia karaktero, lia eco. Nur tute noblaj indianoj, kiel ekzemple Winnetou, neniam evitis tiam, kiam necesis, ekfari honestan, malkaŝan atakon, kaj eĉ antaŭe anonci tion; sed ĝenerale la indiano ne pensas ĝin esti ruze agi laŭ tiu maniero. Tial Tatela-sata estis hezitanta tiel longe. Kaj tial li estis dezirinta mian alvenon. Tial plej ege gravis al li ekscii laŭeble baldaŭ sur kiu flanko mi estis serĉenda, ĉu sur lia aŭ sur tiu de la monumentkonstruantoj. Ekde li estis sciigita de la Nugget-tsil, ke mi starus lojale sur lia flanko, li sentis sin liberigita de sia plej granda aflikto. Li estis esperinta de tago al tago, ke mi venus, kaj nun kiam mi finfine estis alveninta, li demandis min, ĉu mi pretis esti verece lia „Shatterhand“, lia bategmano, per kies helpo estis eble al li venki liajn kontraŭulojn.

„Mi pretas“, mi respondis. „Kaj mi proponas, ke ni komencas tuj, laŭeble ĵus nun, ankoraŭ hodiaŭ. Unue per graco kaj amo, sed tiam, se tio ne efikiĝos, per ĉiuj eblaj pugnoj!“

Tio kontentigis lin komplete. Li donis ĝeneralan plenrajtigon al mi fari ajn kio plaĉis al mi kaj disponi pri ĉio, kio ŝajnis necese al mi. Do mi estis mastro de mi mem, kaj sen ia kateneno aŭ barilo, kiu povis malhelpi al mi. Tion mi memkompreneble ekuzis sen hezito.

Unue gravis vidi la modelon de la statuo. Tial ni rajdis tuj post la manĝado malsupren al la urbo, mi, la Koretinjo, Pappermann kaj Intŝu-inta, la servisto. Tiu petis al mi rajti kunpreni ses junajn, sed tamen jam spertajn kaj energiajn „Winnetou“ojn, kiuj estu mia gardistaro. Tatela-sata ĝin deziris tiel. Mi akceptis tre ŝate. Mi intencis fari multon, dum kio tiuj homoj povis esti tre utile al mi.

Ni ne rajdis tuj al la urbo, sed mi direktiĝis, alveninte malsupre en la interna valo, unue al la vuala falo. Ni eksploris ĝian tutan ĉirkaŭon, ankaŭ la du diablajn katedrojn je ambaŭ flankoj de la libera placo. Ni faris tion tiel neembarasite kiel eble pro ne evidentiĝi, kaj mi ne eldiris unu vorton pri la pensoj, kiujn mi havis dum tio. Sed la „servisto“ estis, kiel mi tre baldaŭ rimarkis, tre akra observanto, kio tute ne miris min, ĉar ja Winnetou estis edukinta lin. Li rigardis ĉiun el miaj vidoj. Li pripensis. Per lia bone provita sagaceco li tre baldaŭ trafis la ĝustan spuron. Kiam ni returniĝis, pro rajdi laŭ la jam priskribita, profunde enbatumita valvojo eksteren al la urbo, li direktigis sian ĉevalon kelkajn momentojn flanken de la mia kaj diris:

„Old Shatterhand ne volis vidi la vualan falon.“

Mi vidis al li demande.

„Ankaŭ ne la komencitan Winnetou:n, kiun oni volas konstrui“, li pluis.

„Sed kion?“ mi scivolis.

„La du ‚oreloj‘ de la diablo“, la ĝustan kaj la malĝustan.“

Li pravis. Nur pro tiuj du ‚oreloj‘ mi estis iĝinta sur la vojon al la interna valo. Ili estis eksternorme gravaj. Eĉ multe pli gravaj ol la belega akvofalo mem.

„Hm!“ mi grumblis.

Tio instigis lin esprimiĝi libere.

„Mi konas ilin“, li asertis. „Sed ne veras, kion oni diras pri ili. Oni povas stari ajn kie oni volas, sed oni aŭdas nenion.“

„Ĉu vi jam staris ĉie?“

„Jes, ĉie. Eĉ malantaŭe, kien neniu rajtas iri, ĉar estas malpermesita. Sed ankaŭ tie oni aŭdas nenion.“

„Ĉu vi promesas al mi esti prisilenteme?“

Li metis la manon sur la koron kaj respondis:

„Al vi same ŝate kiel tiutempe al mia Winnetou!“

„Do vi baldaŭ lernos aŭdi. Mi montros al vi, kiel oni faras tion. Ĉu vi eble konas la ‚Valon de la Kavoj‘ ĉe la Mount Winnetou?“

„Tute detale!“

„Ĉu eble ankaŭ la kavon?“

„Same.“

„Ĉu ĝi grandas? Ĉu ĝi longas?“

„Tre grandas kaj tre longas! De tie ĉi oni rajdas preskaŭ kvin horojn, ĝis oni atingas ĝin, sed tamen ĝi estas tiel longe, ke ĝi iĝas ĝis la vuala falo kaj finiĝas nur en ĝia proksimo.“

„Ni rajdos tien morgaŭ frue pro esplori ĝin. Pretigu ĉion. Sed diru eĉ ne unu vorton al iu homo!“

Per tio tiu parolŝanĝo estis je la fino, ĉar nun la interna valo estis malantaŭ ni, ni rajdis tra la roka pordego kaj vidis la tendurbon situi antaŭ ni. En ĝi nun regis pli vigla hommoviĝo ol je la horo de nia alveno. Rajdantaro venis renkonte al ni. Laŭ ĉiu ŝajno ili volis iri supren al la kastelo. Kiam tiuj homoj ekvidis nin, ili haltis. Nur du el ili plura rajdis, ĝis ili atingis nin. Tiuj estis Atabaska kaj Algonka. Ili sidis bonaspekte sur la ĉevaloj. Post ili estis salutintaj en indiana maniero, Atabaska diris:

„Ni volis iri al la monto pro saluti Old Shatterhand:on, la gaston de la ruĝaj viroj. Ni amis lin, jam antaŭ ni estis vidintaj lin. Ni estimis lin tre alte, kiam ni tiam konatiĝis al li, sen koni lian nomon. Kaj nun, kiam li alvenis tien ĉi, ni ne atendu ĝis li venas al niaj tendoj, sed ni rajdas al li, ĉar li estas la pli alta.“

„Ĉu povas esti inter fratoj iu, kiu rangas pli alte ol la aliaj?“ mi demandis. „Ni apartenas al unu sola patro, kaj ties nomo estas Manitou. Ni estas sur egala rango. Mi vizitas miajn fratojn. Mi petas, ke mi rajtas fumi la pipon de la bonveno kun ili ĉe iliaj tendoj!“

Tiu ĝentileco ĝojigis ilin. Algonka respondis:

„Ni estas fieraj pri la deziro de nia blanka frato. Li venu kun ni. Li vidos amikojn. Konatuloj el eksaj tempoj, kiuj estis alvenintaj tien ĉi. Kiam ili aŭdis, ke li jam estas ĉeestanta, ili petis nin, ke ili rajtas kunrajdi al la monto pro plezuriĝi pri lia vizaĝo. Tie ili atendas.“

Li montris al la grupo, kiu estis haltinta. Ni rajdis tien. Kiuj ili estis? Kiun mi rekonis tuj, malgraŭ la longa tempo, kiu estis inter la tiutempa kaj la nuna horo? Estis Vagare-

teĵ, la ĉefo de la ŝoŝonoj, Mato-ŝako, la ĉefo de la Ozagoj, kaj pluraj da iliaj subĉefoj. Kiel granda estis nia ĝojo revidiĝi! Ankaŭ Avat-vila tieis, la centjaraĝulo! Ĉu oni povis pensi tion eble? Tute memkompreneble li ne estis povinta nun kunrajdi al la monto. Li estis restinta sidante antaŭ sia tendo kaj mi petis rajti viziti kaj saluti lin unue. Oni estis volinta igi Vagare-tej:n kaj Mato-ŝako:n starigi iliajn tendojn en la suburbo; sed ili estis estintaj tiel saĝaj informiĝi pri la cirkonstancoj, kaj kion ili aŭdis, igis ilin rajdi al la supruburbo pro akompani Atabaska:n kaj Algonka:n.

Ni unue rajdis al la tendo de Vagare-tej, kiu loĝis kun sia maljuna patro, sed apenaŭ estis ekmoviĝintaj pro fari tion, kiam du pohonim-komanĉoj venis renkonte al ni, kiuj ankaŭ volis rajdi supren al la kastelo, sed, kiam ili vidis nin, ekhaltis kaj turniĝis al mi. Ili estis senditaj de Young Surhehand kaj Young Apanatŝka pro inviti min al la du junaj artistoj, kiuj estis neĉeestintaj dum nia alveno. Ili aŭdis, kiam ili tiam venis, ke mi estis alvenintaj, kaj nun postulis al mi per tiuj mesaĝistoj veni al ili, ĉar ili intencis montri al mi ĵus ankoraŭ hodiaŭ ilian verkon, la statuon de Winnetou. Mi jam malfermis la buŝon pro doni respondon, jen Atabaska postulis al mi per manmovo esti silente kaj memtransprenis la aferon, dirante al la du komanĉoj:

„Vi jen vidas Atabaska:n kaj Algonka:n, la ĉefojn de la plej foraj, nordaj popoloj, krome Mato-ŝako:n, la ĉefon de la ozagoj, kaj Vagare-tej:n, la ĉefojn de la ŝoŝonoj. Tuj reeniru al Young Surehand kaj Young Apanatŝka kaj diru al ili, ke ni tuj interparolu kun ili, tuj! Ili tuj venu! Temas pri io tre grava!“

Li parolis en tiel insista sono, ke la du mesaĝistoj ne riskis kontraŭi per unu vorto, kaj laŭeble rapide foriĝis. Tiam ni pluigis nian vojon al la tendoj. Tiuj, kiuj apartenis al Atabaska, Algonka, Vagare-tej kaj Mato-ŝako estis proksime unu al la alia. Ni vidis, jam antaŭ ni atingis ilin, la centjarulon sidi tie. Lia blanka, malsupren ligitaj haroj pendis longe malsupren laŭ lia dorso. Li ne estis ostaro kiel Kiktahan-ŝonka. Li ankoraŭ povis moviĝi sufiĉe facile. Lia okulo estis klara kaj la sono de lia voĉo tiel freŝa kaj insista kiel tiu de kvindeka aŭ sesdeka jaraĝulo. Li ekstaris, kiam li vidis nin veni, sen fremda helpo de la tero kaj estis sciigita de Vagare-tej, sia filo, ke la trupo revenis tiel rapide, ĉar oni estis renkontinta min tute neekspektite, min kaj mian *squam*:on. Lia vizaĝo estis plena je sennombraj, etaj faldetoj, kiuj sed en neniun maniero malbeligis ĝin. Li havis tute neniun makuleton, tute neniun trajton, tute neniun malbelan lokon, per kiu lia pureco, kio ja kutime ofte okazas en la maljuneco, estis aĉigita. Li estis bela, vere bela altaĝulo! Kiam li vidis min, li tuj rekonis min. Liaj maljunaj, bonaj okuloj brilis per ĝojo. Li venis renkonte al mi, metis ambaŭ brakojn ĉirkaŭ mi, tiris min al si kaj elvokis:

„Ho Manitou, ho Manitou, vi grandulo kaj bonkorulo! Kiel mi dankas al vi pro tiu feliĉo, pro tiu ĝojo! Kiel mi sopiris unu fojon revidi la plej bonan, la plej sinceran amikon de ĉiuj ruĝaj popoloj, antaŭ ke mi disigas la nekonatan akvon de la morto per kuraĝe naĝanta brako! Mia sopiro estis plenumigita. Mi eksciis, ke li venos! Tiam mi decidis ankaŭ veni. La maljuneco etendas la maldikan brakon pro fiksteno min. Mi sed sentis min esti june kaj deŝiris min. En mia koro eksonis voĉo, kiu diris al mi, ke mi devis hasti al mia blanka frato, ĉar li realportas al ni la bonecon, la amon kaj la unuecon, kiu iam forlasis nin. Kaj apenaŭ, ke mi alvenis, ankaŭ alvenas li! Kaj vi estas lia *squam*, ĉu?“

Tiu demando estis direktigita al la Koretinjo. Ni estis deĉevaliĝintaj. Ŝi staris flanke de mi.

„Ŝi estas“, mi respondis.

Li etendis la brakon al ŝi, tiris ŝin al si same kiel min kaj pluis:

„Li alportas amikinon al ni, blankan fratinon. Ŝi estu benvenata en niaj tendoj kaj en niaj animoj! Mi estas la plej maljuna el ĉiuj! Sidiĝu en cirklo kaj alportu al mi la kalumeton. Ĝi estu unu el la plej lastaj kaj la plej belaj honoroj estri la kuniĝon de la salutado. Old Shatterhand sidiĝu je mia dekstro, lia *squaw* je mia maldekstro. Oni ekbruligu la fajron de la ĝojoj!“

Kiel dirite, tiel farite. Estis eksternorme kortuŝa, reciproka bonvenigo, kiu nun okaziĝis. La pipo senĉese iĝis de mano al mano. Mil memoroj ekaperis, ĉiuj ligataj al la nomo de Winnetou. Sed nun ni ne havas la tempon komplete dediĉiĝi al ili. Tio devis esti prokrastata al pli poste.

Meze en tiun viglan, feliĉan scenon venis Young Surehand kaj Young Apanatŝka. Ili estis sur ĉevaloj, kiel ĝenerale ĉiu tie. Ili deĉevaliĝis. Sed neniu ŝajnis vidi ilin. Ili volis sidiĝi ĉe nin, sed neniu faris spacon por ili. Tiel ili staris tutan, adan tempon. Tiam ili reeniris al iliaj ĉevaloj pro forrajdi. Nun finfine ili estis atentataj. Atabaska vokis al ili:

„La filoj de Old Surehand kaj Apanatŝka paŝu pli proksimen!“

Ili revenis. Lia voĉo havis tiun nerezisteblan sonon, al kiu oni devis obei, eĉ kiam oni ne volas obei. Ĉiu tuj silentis. Neniu parolis. Oni povis aŭdi la mallaŭtan kraketadon de la malgranda fajro. Atabaska demandis ilin:

„Ĉu Young Surehand kaj Young Apanatŝka estas ĉefoj?“

„Ne“, ambaŭ respondis.

„Ĉu Old Shatterhand estas ĉefo?“

„Jes.“

„Jam estas preskaŭ sepdek severaj vintroj, kiujn li traspertis; sed ili jam eĉ ne havas tridek facilajn somerojn malantaŭ ili. Sed tamen ili ne iras al li, sed ili postulas, ke li venu al ili! Ekde kiam estas moro inter la ruĝaj viroj, ke la maljuneco obeu al la juneco, kaj la sperteco al la nesperteco? Ni volas, ke nia popolo ekvekiĝu el la dormado. Ni volas, ke ĝi ekkonu siajn rajtojn kaj devojn. Ni volas, ke ĝi apartenu al la formiĝitaj nacioj. Sed kiel ni atingu tion, se ni respektas eĉ ne la leĝon de la plej sovaĝaj el la sovaĝuloj, ke la juneco respektu la maljunecon?“

Young Surehand fiere enĵetis:

„Ni estas artistoj!“

„Uf, uf!“ Atabaska elvokis. „Ĉu tio estas iu pli bona ol esti homo kaj esti maljuna kaj sperta? Vi estas artistoj, ĉu? Ĉu vi jam pruvis tion? Eble Old Shatterhand ankaŭ estas artisto. Li ne jam markis sin kiel artisto. Sed vi markis vin tiel. Tial ni ekzamenos vin, ĉu tiu marko meritas al vi aŭ ne. Kaj eĉ se artisto estus io tiel eminenta kaj tiel bonega, ke neniu alia homo kapablu atingi lian rangon, oni ja postulu de li ĵus tial la virtojn, kiujn oni postulas vidi je ĉiu alia kutima homo. Demandu viajn patrojn kaj demandu Kolma-puŝin, kion ili ŝuldas al Old Shatterhand! Ĉu li nu pro siaj agoj kaj pro ĉiu amo, kiun li pruvis al ili, devas kuri malantaŭ la filoj, ĉar tiuj asertas pri si mem

esti artistoj? Kion nun valoras tiu via arto? Ĝi donu al ni gigantan bildon de Winnetou! Ĉu vi kapablas tion? Mi kredas, ke ne! Nia eminenta Winnetou estis modesta en ĉiuj rilatoj. Li servis. Li priatentiĝis kaj estimis la altaĝon eĉ je la plej ordinara homo. Lia plej granda plezuro estis helpi, subteni, ĝojigi. Sed vi estas tro fieraj fari eĉ al lia plej bona amiko la unuan viziton, la ĝentilecan viziton, kiu meritas ne al vi, sed al li. Vi do neniam ekkonis aŭ komprenis Winnetou:n. Kiel vi do povas doni al ni bildon de li, kiu veras kaj honestas, kaj ne mensogitan? Kie estas viaj patroj? Ĉu ili ĉeestas?“

„Ne jam. Ili forrajdis hodiaŭ frue. Ili revenos nur je la vespero.“

„Do diru al ili, kiam ili venos, la jenan: La tie ĉi kuniĝintaj ĉefoj postulas de ili, ke ili venu al Old Shatterhand, pro peti lian pardonon pri iliaj filoj. Sed ni venos post paso de unu horo al via argila Winnetou pro ekzameni, ĉu vi estas artistoj aŭ ne. Nun vi povas foriri!“

Ili iĝis sur iliajn ĉevalojn kaj forrajdis, sen eldiri unu vorton de pardonpeto aŭ riski defendiĝon. Kaj kiam ni alvenis post la pasiĝo de la difinita tempo ĉe la granda, alta lignodomo, en kiu ili laboradis pri la modelo, ili staris ĉe la pordo kaj akceptis nin silente kaj honorigaĉe kiel homoj, kiuj ŝate volas ekkoleriĝi, sed ja ne rajtas. Cetere ili estis tute bonaj kaj simpatiaj junaj homoj, kaj mi povis vidi je la Koretinjo, ke ŝi interne ŝate estis pretiginta defendi ilin. Ŝi kapskuis kaj ridetis al ili kaŝe; mi sed rajtis doni al ili nur salutan vidon, nenion pli, pro ne ofendi Atabaska:n.

Kiam ni paŝis en la konstruaĵon, ni vidis tie ĉiujn ‚sinjorojn de la komitato‘ kuniĝinte. Ili estis venintaj tien pro efikiĝi al la ĉefoj, sed estis traktataj de tiuj simple kvazaŭ ili estus nevideblaj kiel aero, tiel ke ili tute ne riskis proksimiĝi al ili aŭ eble eĉ ekparoli al iu el ili.

La domo estis konstruita ronde kiel cirko kaj enhavis nur unu solan ĉambron. La per tolaĵoj kovrita dommuro surhavis bone sukcesitan panoramon de la ĉi tiea placo kun la Mount Winnetou kaj ĝiaj du gigantaj rokturoj. La pli antaŭa, pli malgranda turo kun la ‚kastelo‘ de Tatela-sata, kaj la pli granda, pli alta kun la alte supra fiere malsupren vidanta Winnetou-figuro, memkompreneble nun nur projektate. Sed kiel finigita modelo tiu figuro nun altiĝis en la mezo de la ĉambro. Ĝi estis ĉirkaŭ ok metrojn alte kaj staris en la utila efikiĝo de la tra la malfermitaj tegmentaj truoj eniĝanta supra lumo. Por la malhelaj vesperaj horoj tieis elektra lumigo, la pro tio necesa elektreco estis kreata sen alta elspezo per la akvofalo. Estis kalkulita, ke ĝi poste sufiĉus por la tuta urbo Winnetou.

Mia unua vido estis deĉidita al la vizaĝo de Winnetou. Estis bone trafita, surprizige bone. Sed tamen ĝi ŝajnis fremde al mi. Estis liaj trajtoj, tute ekzakte liaj trajtoj; sed ili ne estis tiel amikece seriozaj, kiel mi konadis ilin, sed ili havis fremdan esprimon, kiu neniam estis proprece al li dum lia vivo. Tiu esprimo sed harmoniis kun la agresa pozo, kiu estis donata al la figuro de ĝiaj kreintoj. La vestaĵoj estis farita per plej pedanta skrupuleco. La per histrikaj haregoj ornamitaj mokasenoj, la brodita *leggings*, la strete suriĝinta, preskaŭ senfalda, leda ĉasĉemizo, la sur la ŝultrojn metita, belega *santillo*-tuko, sub kiuj videblis la maŝoj de la de la dekstra ŝultro al la maldekstra kokso iranta lazo. De la zono pendis la pulva kaj la kugla saketo de la eksaj tempoj. Flanke de ili enestis

la tranĉilo, malproksime de tio pistolo kaj revolvero. Antaŭmetinte la dekstran piedon kvazaŭ pro eksalti, la figuro apogis sur en la maldekstra mano tendata argĉntpafilo, dum la dekstra mano minacante etendis ŝarĝitan duan revolveron. En tiu antaŭen strebanta movumo la figuro havis ion serpentecan. Aŭ oni pensis pri pantero, kiu ek-rapidiĝas el sia embusko pro ĵetiĝi sur la oferobeston. Al tio ĝustis la ja ne nur minacanta, sed avida esprimo de la vizaĝo, kiu ŝajnis ju pli strange aŭ repuŝe, des pli klare la beleco de la trajtoj tamen evidentiĝis.

„Domaĝe, plendige domaĝe!“ la Koretinjo flustris al mi.

„Bedaŭrinde, bedaŭrinde!“ mi respondis. „Kaj ili estas artistoj, veraj artistoj!“

„Tute sendube! Nur la koncepto malĝustas. Estas peko, ega peko! Kiel oni povis fari ion kiel tion al Winnetou, tion mi ne komprenas! Kaj tiu figuro staru sur la alteco de la monto!“

„Neniam, neniam! Mi ne toleras tion. Kaj kiam oni ne respektos min, mi uzos la lastan rimedon kaj disbatos ĝin antaŭ ĉiuj iliaj okuloj!“

La ĉefoj silentis. Ili malrapide paŝis ĉirkaŭ la figuro pro vidi al ĝi de ĉiuj flankoj, sed diris nenion. Young Surehand kaj Young Apanatŝka staris en la proksimo. En iliaj vizaĝoj esprimiĝis eĉ ne la plej eta scivolo. Ili estis komplete konvinkitaj, ke la impresoj de ilia verko estus grandioze al ni. La sinjoroj de la komitato havis la saman opinion. Ili estis ekspektintaj, ke ni estus ekkriintaj elvokojn de ravo. Sed kiam pasis minuto post minuto, sen ke unu el ni eldiris vorton, ili komencis fari antaŭagon al ni, per ke ili nun mem faris tion, kion ni faris ne. Ili faradis laŭdantajn interjekciojn pro igi nin agi laŭ ilia ekzemplo. Sed la efiko, kion ili sukcesis, estis ĵus kontraŭe al tiu intenco: La ĉefoj turniĝis al la eliro. Ili elpaŝis, unu post la alia. Mi sekvis kun la Koretinjo. Tiam la komitato, la du artistoj antaŭe, haste sekvis nin. Ili volis informon. Atabaska estis la unua, kiu surĉevaliĝis. Li atendis, ĝis ni aliaj estis suriĝintaj, kaj tiam turniĝis al la demandantoj:

„Tiu via Winnetou estas la plej granda mensogo, kiu iam eksonis tie ĉi inter la montoj. Disbatu ĝin! Mi ne toleros, ke ĝi estos tie supre, neniam, neniam, neniam!“

Dum tiuj vortoj li montris al la alteco, sur kiu la figuro devis esti starigota.

„Neniam!“ Algonka kunsentis.

„Neniam — neniam — neniam — neniam!“ ankaŭ la aliaj ĉefoj kaj iliaj subĉefoj aldiris.

„Sed ĝi estos tie supre!“ Young Shurehand vokis.

„Jes, estos tie supre!“ ankaŭ Young Apanatŝka asertis. „Pravu, ke estas mensogo!“

Kaj *Mr. Antonius Paper*, la ĉiam trohastema, demonstrative ruliĝe venis al ni kaj vokegis al ni:

„Ni estas la komitato pro la starigo de la Winnetou-monumento. Kion ni decidis, tio okazos. La figuro estos tie supre, supre, supre!“

Dum tio li svingegis siajn brakojn, ĵus antaŭ la ĉevalo de Mato-ŝako. Tiu faris rapidan femuran ekpuŝon, rajdis lin teren kaj respondis:

„Ĉu vere? Vi estas la komitato, ĉu? Do ni degradas vin kaj balotas alian!“

„Jes, alian, alian!“ la subĉefoj vokis, dum *Mr. Antonius Paper* pene leviĝis de la tero kaj serĉis savon malantaŭ la aliaj membroj de la komitato.

Jen la unua prezidanto, profesoro Bell, ekhavis antaŭsenton, ke la efikiĝo de la intenco ja vere ne estis tiel certe, kiel li estis supozinta antaŭe, kaj ke la nuna momento estis eble tre decidiga. Li faris kelkajn paŝojn al mi kaj demandis:

„Kiun opinion nun havas Vi, *Mr. Shatterhand*? Mi petas Vin diri tion al mi!“

„Ho, tio, kion mi pensas, ja tute ne gravas tie ĉi“, mi respondis.

„Tio ne veras!“ li kontraŭis. „Mi estas konvinkita, ke oni faros, kion Vi proponas. Tial mi petas al Vi diri al mi: Kion Vi proponas?“

„Pro tio nun certe ne estas la ĝusta tempo kaj tie ĉi ankaŭ ne la ĝusta loko. Mi tute ne jam konas la al mi donotan pozicion. Mi povos do paroli nur tiam, kiam mi havos mian numeran kuponon. Eble *Via* skribisto havas la bonvolon sendi ĝin al mia nuna loĝejo.“

Post tio mi forrajdis. La aliaj tuj sekvis. Ni ĉiuj havis la supozon, ke povis okaziĝi nenio, antaŭ ke ni estis interparolintaj kun *Old Surehand* kaj *Apanatŝka*. Tio do estis atendenda. Post tio ni adiaŭiĝis de la ĉefoj kaj rajdis al la tendoj de la suo-virinoj, pro inviti niajn amikinojn, la du *Aŝta*:jn tiun vesperon al ni. Ili ĝojigite akceptis. Tiam ni re-eniris al la ‚kastelo‘, transdonis niajn ĉevalojn tie kaj grimpis tra la arbaro piedire al la gardoturo, pro serĉi la ‚*Junan Aglon*‘ kaj ankaŭ kuninviti lin por la vespero. Ĉe li estis pluraj geindianoj, kiujn li okupis per facilaj lignaj kaj bastaj laboroj, kial kaj pro kio, tion mi ne demandis.

Tatela-sata hodiaŭ ne plu estis videble. Li pensis ĝin esti pli ĝuste lasi min esti mia propra estro, kiel ankaŭ mi estis intencinta ne plu viziti lin ĝis tio estus necese. Tiel ni restis sole je la vespero kun niaj tri karaj gastoj kaj rigardis kun silenta ĝojo, en kia senfine softa maniero la koroj de la junaj homoj ĉiam kaj ĉiam pli interproksimiĝis. Mi estis pensinta ĝin eble, ke *Old Surehand* kaj *Apanatŝka* estus alvenintaj ankoraŭ hodiaŭ vespere al mi. Sed tio ne okazis. Sed pro tio mi trovis, kiam mi stariĝis je la sekva mateno, mesaĝiston de ili. Ili lasis diri al mi, ke mi certe scius, kiel ege ili amis kaj estimis min, kaj kiel ili ĝojis revidi min; sed estus neeble al ili viziti min en la loĝejo de ilia kontraŭulo *Tatela-sata*. Mi decidiĝu inter ili kaj li; tria ebleco ne ekzistis. Cetere ili estis, se mi venus al ili en la suburbon, paroleblaj je ĉiu tempo. Pro pardonpeto ne estis kaŭzo, ĉar estis estinta neniu ebleco viziti min en la ‚kastelo‘.

Ne ekideis al mi afliktiĝi pri tiu mesaĝo. Ĉiukaze tie efikiĝis aĵoj, kiujn mi ne konis kaj kiuj ankaŭ ne konendis al mi. Nur unu aĵo atentindis tie ĉi, fakte: Aĵn kiu ne volas, tiu devas! Kaj hodiaŭ frue mi plej malmulte havis emon kaj tempon okupiĝi per privata kverelaĵoj. Mi devis iri al la ‚*Valo de la Kavoj*‘ pro havi konon de la loko, kiam la mal-amikoj venis pro kaŝiĝi tie.

Intŝu-inta, nia grandega ‚servisto‘ jam ekpretis de la matena krepusko pro gvidi nin tien. Li estis prizorginta ĉion, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kandelojn, torĉojn, ŝnuregojn, hokojn kaj ĉiujn aliajn aĵojn, kiujn ni bezonis pro konatiĝi al la kavoj, aĵn ofte tio necesis. Ĝi estis eksternorme grava al mi. Estus vere estinta malfacile al mi doni klarajn kaŭzojn pro tio. Tio estis plie antaŭsento ol certa, difinita scio. Sed ekde mi estis vidinta, kiel subite la vuala falo malaperis en la teron, kaj ekde mi sciis, ke la subtera kavoj iĝis ĝis proksime al tiu falo, estis al mi, kvazaŭ ĝi havu ne tute sengravan rolon en la ĉi tieaj okaziĝoj.

Pro la pli bona kompreno de tio, kio sekvas nun, mi memorigas pri la fama mamuta kavo en Kentucky en la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kiu havas kun ĝiaj flankokavoj longecon de pli ol tricent kilometroj. Ĝia ĉefa koridoro etendiĝas sub la tero en distanco de dek ses kilometroj. Tieas sennombraj ŝaktoj, galerioj, koridoroj, kanjonoj, haloj, ĉambroj, ĉambregoj, grotoj, katedraloj, lagetoj, lagoj, riveretoj, riveroj kaj akvofaloj. Tiel samspece mi imagis la kavon ĉe la Mount Winnetou, kaj la sekvo evidentigis, ke mi ne estis erarinta pri tio. Ĝi ja ne havis tiajn gigantajn dimensiojn, sed miraklaĵoj ankaŭ tieis sufiĉe. Aparte estis la tute abundaj kaj nekompareblaj stalaktitaj formiĝoj, kiujn ni admiris.

La vojo al la kavo ne kondukis tra la urbo kaj tiam laŭ la „Blanka Rivero“, sed oni rajdis sur la alia flanko malsupren laŭ la altaĵo kaj tiam devis sekvi rivereton, kiu laŭŝajne havis la intencon konduki ĉiun, kiu konfidiĝis al ĝia gvidado, reen tien, de kie li estis veninta. Ĝi iris ĉiam cirkle, sed en ŝraŭbecaj kurboj ĉiam pli malsupren. Dum tio speciale videbliĝis la pli malgranda Mount Winnetou, sur kiu loĝis Tatela-sata, de ĉiuj eblaj vidpunktoj. Unu fojon ni povis aparte klare ekkoni la grandan militaglan neston, al kiu estis grimpinta nia amiko, la „Juna Aglo“ Tio estis la kaŭzo, ke la Koretinjo demandis la „serviston“, ĉu li estis aŭdinta pri tiu okaziĝo. Hodiaŭ nur Pappermann, sed ne la „Juna Aglo“ estis ĉe ni; tiel ni povis paroli pri tiu lia aventuro sen esti nediskrete.

„Jes, mi scias ĉion“, Intŝu-inta respondis. „Mi ja staris flanke de Tatela-sata, kiu sidis antaŭ sia pordo, kiam la „Juna Aglo“ venis flugante malsupren de la nesto de la militaglo kaj surteriĝis ĵus antaŭ niaj piedoj. Mi kunhelpis mortbati tiun aglinon, kiu estis multe, multe pli grande ol la viraglo. Pli forta, pli granda kaj pli agresema birdo ol tiu aglino neniam estis estinta en la tuta vivo. Kiun aĝon ĝi havis, tion oni ne sciis jam ekde longe. Ajn ĉiu konis la aglinon. Ĝi ne toleris viraglon en la proksimo; ĝi mordis kaj forpelis ĝin. Oni atribuis al ĝi eksternormajn fortojn. Oni asertis, ke ĝi povis porti plenaĝan prerilupon al la nesto. Tiutempe la „Juna Aglo“ aĝis dek du jarojn. Li loĝis tie ĉi ĉe ni. Li estis parenculo de Winnetou, kaj la karulo de ĉiu, kiu konis lin. Malgraŭ tiu lia nura juneco li iris al la nordo, pro haviĝi la argilon por sia pacopipo el la sanktaj ŝtonminejoj de Dakota. Kiam li revenis kun la argilo, kaj la pipo estis skulptita, li deklaris, ke li volis nun ankaŭ akiri sian medicinon. Li iris en la dezerton kvardek tagojn pro fasti, kaj tiam li songis, ke li estis nomiĝonta la „Juna Aglo“, kaj tial devis haviĝi la du junajn militaglojn el la nesto; ke la ungoj kaj la bekoj estu liaj medicinaĵoj. Li estis malforte de la fastado. Li ankoraŭ apenaŭ pezis la duonon de antaŭe. Tamen li riskis tuj agi laŭ la postulo de la songo, sen unue dece ripozi. Li prenis lazon, enpoŝigis tranĉilon kaj multajn rimenojn kaj komencis la grimpadon supren al la alteco de la nesto. Alveninte supre, li trovis ke la nesto estis nealirebla. Pro atingi ĝin oni devis grimpi kelkan distancon pli supren, kaj tiam lasi sin dependi laŭ la lazo. Li faris tion. Li fiksigis la lazon je la eliganta roko kaj tiam malsupreniĝis laŭ tio. Sed la lazo tro mallongis. Kiam li atingis la finaĵon, li ankoraŭ ŝvebis alte super la nesto, kaj la fortoj forlasis lin. Li malfermis la manojn kaj saltis en la neston. La lazo svingis alte super li jen kaj reen, kaj ne estis atingebla al li plu.“

„Kiel terurige!“ la Koretinjo elvokis. „Ĉu ne estis vojo el la nesto?“

„Ne“, la rakontanto ridetis. „Agloj kutime ne nestas ĉe vojoj. La agla patrino ne ĉe-estis; sed la du idoj kuŝis tie. Ili malfermŝiris la bekojn kaj kriis timplene al la invadinto. Li mortigis ilin, deŝiris iliajn kapojn kaj la ungojn, enpoŝigis tiujn kaj ĵetis la korpojn en la profundecon. Tiam li komencis pripensi, kiel li eble povis foriĝi. Sed neniu ebleco videbiĝis al li. Alte super li la lazo, kiun li ne povis atingi, sub li la teruriga profundo, kaj li mem en la vertige alta nesto, el kiu neniu rato, neniu muso estus trovinta savigan vojon, des malplie homo! Kaj dum li ekkonis tion, li vidis la aglinon proksimiĝi, kun malgranda ĉasbesto en la ungoj, kiun ĝi estis ĉasitaj por iliaj idoj. Jam kiam ĝi ekvidis lin, ĝi lasis ĝin fali kaj flugegis al li kun raŭka krio. Li elzonigis sian tranĉilon pro defendiĝi. Sed en la sama momento estis al li, kvazaŭ laŭta, averta voĉo vokis al li: „Ne mortigu ĝin, kaj ne lezu ĝin, alikaze vi pereos! Ĝi estas via sola savo!“

„Ha, flugi!“ diris la Koretinjo, profunde enspirante.

„Jes, flugi!“ Intŝu-inta kapjesis. „Tio estis la sola; ne estis io plu.“

„La bedaŭrinda knabo! Kiel li ebligis tion?“

„Ne: la bedaŭrinda knabo! Sed: la brava, la ruza, la kuraĝa knabo. Ne povas esti bedaŭro tie, sed nur admiro! La nesto estas sur eta rokelstarajo, de kiu kondukiĝas malvasta fendo en la internon de la roko, sed baldaŭ finiĝas. Tie kuŝis la lignaĵoj kaj branĉoj de la eksaj jaroj de la nesto, ĉar la militaglo konstruas sian neston ĉiam nove ĉiun jaron, kaj do ankaŭ ĉiam pli alte. Sukcesis al la knabo saviĝi en la fendon, jam antaŭ ke la krianta rabbirdino atingis la neston kaj komencis la furiozan atakon. Li rampis iom post iom preskaŭ tute sub la lignaĵojn kaj defendiĝis per ili. Dum tio li plej diligente pripensis, kiel li povis saviĝi. Li estis tiel saĝe kompreni ke tio estis nur eble, per ke la aglo portis lin malsupren en la profundon. Li demandis sin, ĉu li eble ne estus tro peza por la birdo, malgraŭ lia nuntempa malpezeco. Dum li pensis tion, la maljunulino ĉesis la atakon pro serĉi siajn idojn. Per tio li ekgajnis tempon pro pli trankvila pripensado.“

„Li troe pezis!“ la Koretinjo time enŝovis.

„Tio fakte estis supozinda“, Intŝu-inta asertis. „Do ne povis esti certa, trankvila flugado, tute aparte de tio, ke la aglo rezignus per ĉiuj fortoj porti lin. Sed kiam estis ne vera flugado, tamen ne estis vera falado en la profundon. Estis antaŭvideble, ke la flugilsvingoj malaltiĝus la subitecon kaj la rapidecon de tiu falego. Do gravis kateni la aglon tiel, ke ĝi povis lezi la knabon nek per la beko, nek per la ungegoj, sed tamen povis flugi. Maŝoj kaj katenmanieroj, per kiuj oni sukcesas tion, estas konataj al ĉiu indiano, eĉ de la infanoj. Apenaŭ ke tiu penso estis finigita, ĝia efikigo estis pretigata. Rimenoj tieis pli ol sufiĉe. Per la helpo de ĝusta, el la nesto tiritaj lignaĵoj kaj tri rimenoj estis plej rapide farata bekŝtopilo, kiu devigis la aglon etendi kapon kaj kolon rekte antaŭen. Tiel la uzado de la danĝera beko estis malebligita al ĝi. Por la kaptiloj aŭ ungegoj estis kvinobla maŝo, kiu pli poste devis esti plie fiksata plu. Por la korpo maŝo, kiu havis la celon kunigi la flugilojn kaj igi ilin dense al la korpon, memkompreneble nur ĝis la momento, kiam la flugado devis komenci. Pluraj lignaĵoj estis fikse pinĉataj en la fendon, tiel ke formiĝis speco de latiso pro la gardo de la en tie estanta knabo. Kiam la aglo volis ekataki, ĝi estis devigata meti la kapon tra tiun latison, kiu tiam povis esti tre facile ekprenata kaj fikstenata per la maŝo.“

Mia edzino estis eksternorme scivola, mi ne malpli. Pappermann preskaŭ forlegis la vortojn de la lipoj de la rakontanto. Intŝu-inta pluis:

„Mallongan tempon post tiuj pretiĝoj estis faritaj, la aglino revenis. Ĝi laŭŝajne estis trovinta la kadavrojn de siaj idoj, ĉar ĝi atakis sian malamikon per eminente pli ega furiozo ol antaŭe. Ĝi tute ne pensis pri ne meti la kapon tra la latiso. Tuj la maŝo estis metata ĉirkaŭ ĝian kolon, kaj ĝi povis defendiĝi ajn kiel ĝi volis, kelkaj minutoj poste la ŝtopilo estis fiksita en ĝia beko, kio devigis ĝin etendi kapon kaj kolon antaŭe. Ĝi defendiĝis per ĉiuj korpofortoj, per la flugiloj kaj la ungegoj. Tiuj estis tre facile fiksigitaj en maŝoj, kaj tiam fikse kunligataj. Pro trankviligi la flugilojn, la knabo devis tiri la grandegan rabobirdon, kiu sed jam nun ne kapablis defendiĝi plu, duone al si en la fendon, pro premi liajn flugilojn al la korpo, kaj tiam fiksligi ilin per rimenoj. Kiam tio estis okazinta, la aglo ne povis moviĝi plu. Ĝi estis komplete subigite; la venkinto sed havis eĉ ne plej etan lezaĵon post tio, la birdo aliflanke same ne. La plej malfacila aĵo estis farita; la plej riskema povis komenciĝi, fakte la fluganta falego aŭ la falanta flugado en la terurigan profundon.“

„Dank’ al Dio, ke ne estis mi!“ Pappermann komentis. „Tiu riskaĵo certe ne estus sukcesinta al mi. Ajn kiun la sorto kondamnis nomiĝi Pappermann, tiu restu sur fiksa tero, alikaze li fartos tre malbone! Sed plu, rapide plu! Mi scivolemas!“

La servisto pluis:

„Nun ke la rabbesto estis nedanĝerigita, la knabo povis reforlasi la rokan fendon. Li paŝis antaŭen kaj vidis en la abismon. Eĉ ne nuanco de malkuraĝo regis lin. Tute ne ekideis al li heziti nur momenton. Nun la aglo ankoraŭ havis sian plenan forton. Ju pli li malfortiĝis, des pli danĝeris la salto de la nesto eksteren en la oscedantan nenion. La birdo fiodoris kiel sango kaj sovaĝa besto. Ĝiaj grandaj, rondaj okuloj ardis per kolero kaj malamo. Sed tamen nur ĝi sole povis esti la savanto! Tiuj estas enigmoj, kiujn povas solvi nur iu, unu sola, kaj tiu unu sola estas bona, estas eterne bona! La knabo fiksitis la plej bonajn el siaj rimenoj laŭ sub liajn brakojn trans brusto kaj dorso, fiksitis ilin al la ungegoj de la aglo, sed tiel, ke la svingantaj flugiloj de la birdo ne povis lezi lian vizaĝon, kaj tiris ĝin nun ĝis dense al la rando de la abismo. „Ho Manitou, ho Manitou!“ li elvokis. Tiam li distranĉis la du rimenojn, kiuj estis fikstenintaj la flugilojn al la korpo. La aglo movis ilin; ĝi klopodis disvastigi ilin, sed ĝi ne povis leviĝi, ĉar ĝiaj ungegoj estis kunligitaj. „Ho Manitou, ho Manitou!“ la knabo preĝis refoje. Tiam li fermis la okulojn, malrapide elpaŝetis trans la rando de la roko kaj postetiris la birdon.“

„Plu, plu!“ Pappermann vokis. „Mi ne povas pacienciĝi!“

„Jes, rapide, rapide!“ ankaŭ petis la Koretinjo. Intŝu-inta obeis:

„Mi diris, ke la knabo fermis la okulojn. Ĉu li falegis? Ne. Li estus krevinta post malmultaj sekundoj malsupre en la profundo. Sed la sekundoj pasis, kaj li ankoraŭ vivis. Super li muĝis flugiloj. Li ŝanceliĝis jen kaj reen. La aglo kriis senĉese. Ĝia kriadon sonis trans monto kaj valo, ke ĉiu homo devis vidi al la alteco. Tiam la knabo malfermis la okulojn. Li vidis, ke li falis, falis daŭre, sed ne falege, sed malrapide, en ebena iranta ŝraŭba linio. La aglo defendiĝis. Ĝi ne volis malsupren. Ĝi efikiĝis ĉiujn fortojn de siaj flugiloj. Sed la knabo troe pezis; li tiris ĝin malsupren, ĝis en la proksimon de la kastelo.

Tie ili atingis la fiksan teron. Sed la knabo ne jam estis savita. Li ne plu havis sian tranĉilon. Li ne povis distranĉi la rimenojn, ne liberiĝi de la birdo, kiu klopodis realteniĝi. Okazis interbatalo, en kiu la aglo estis pli forta ol la knabo. Ĝi batis lin per laflugiloj, ĝi ŝiris lin jen kaj reen. Homoj alhastis. La timo antaŭ ili duobligis la fortojn de la aglo. Ĝi venkis la de ĝi pendanta ŝargō. Ĝi unu fojon plu iĝis en la aeron, kvankam ne alte. Ĝi flugis mallongan distancon, tiam li reiĝis sur la teron, kiun ĝi atingis ĵus antaŭ ni, antaŭ Tatela-sata kaj mi. Tie estis ŝtono. Mi levis ĝin, kaj ni mortbatis la gigantan birdon. La knabo estis savita. La flugilbatoj estis lezinte lin malbone; sed li ridetis. Li eĉ ĝojkriis. Ĉar li estis sukcesinta, kiun li volis akiri, fakte lian medicinon. Ekde tiam li estas nomata la „Juna Aglo“, kaj la flugado estas, pri kio li parolas plej ŝate. Li eĉ estis irinta al la urboj kaj vilaĝoj de la palvizaĝoj pro lerni ĝin tie.“

„Kaj ĉu li kapablas ĝin?“ la Koretinjo demandis.

„Tion mi ne jam scias. Sed li jam ekde hieraŭ estas okupata konstrui proprajn flugilojn por si. Do li fakte ŝajnas kapabli ĝin. Sed tion rajtas scii nur ni, ne aliaj.“

Dum tiu rakontado ni estis antaŭeniĝintaj longan distancon, kaj sekvis nun tutan vicon de valoj kaj valetoj, kiuj estis ligitaj unu al la alia, sed kondukis al tiel diversaj direktoj, ke ofte estis malfacile diri, ĉu ni rajdis norden aŭ suden, orienten aŭ okcidenten. Ni jam estis survoje pli ol tri horoj. Tiam ni atingis malgrandan riveron, je kies klara akvo estis rimarkebla, ke ĝi ne venis el tera aŭ eĉ argila, sed el roka regiono.

„Tiu ĉi estas la „Akvo de la Kavoj“, laŭ kiu ni nun rajdos kontraŭfluen“, Intŝu-inta diris. „Ĝi venas el la kavoj, do kondukas nin rekte al nia celo.“

Ni iĝis en tiun direkton. Kiam ni rajdis laŭ tiu akvo, ni estis atingintaj la plej malaltan punkton de nia hodiaŭa vojo. Nun ni rerajdis supren, al la Mount Winnetou, kvankam de alia flanko. Ni estis farintaj longan kromvojon. Birdfluge ni nun staris multe pli proksime al la monto. La valo de la rivereto estis malvasta kaj dense surkreskita per pingloarboj. Ofte ni ne trovis sufiĉe da spaco pro antaŭeniĝo per la arbarkreskaĵoj. Tio pludaŭris pli ol unu horo. Dum tio la flankoj de la rivereta valo ĉiam kaj ĉiam pli altiĝis. Tiam venis loko, kie ili subite vaste disiĝis kaj kondukiĝis eble duonan rajdohoron en tute rekta direkto. Per tio formiĝis granda, longa, kaseroleca termalaltaĵo, kies bazon la rivereto tratranĉis kiel ŝnuro antaŭmezurita per liniilo. Je ambaŭ flankoj altiĝis tute miriga kreskaĵaro de gigantaj arboj. Inter la grandegaj trunkoj estis abundaj subkreskaĵoj amase. Dense ankaŭ estis la arbedaroj, kiu kovris la teron de tiu valkaserolo. Unuopaj pinglaj kaj foliaj arbopintoj elstaris de tio. Ĉi tieis folioj kaj herboj en abunda amaso, pro paŝtado de la ĉevaloj. Sed, kiam la nombro de la ĉevaloj mezuriĝis per miloj, kaj ili devis resti ne nur kelkajn tagojn, sed pli longan tempon, ankaŭ tiu amaso ne sufiĉis.

„Tiu estas la Valo de la Kavoj“, Intŝu-inta diris.

„Kaj kie estas la kavoj?“ la Koretinjo demandis.

„Tute malantaŭe, je la fino de la valo, kie ĝi rekte iĝas al la Mount Winnetou. Venu!“ Ni plurajdis.

Do estis tie ĉi, kie la alianciĝintaj suoj, jutoj, kajovajoj kaj komanĉoj volis kaŝiĝi. La loko ne estis mise elektitaj de ili. Ĝi nur situis tre malproksime for de ni, kaj ajn kiu

volis ataki nin de tie ĉi, tiu antaŭe transu kvin horojn longan, penigan vojon. Aŭ ĉu eble estis pli mallonga, pli komforta vojo? Kaj ĉu ĝi estis konata al niaj kontraŭuloj? Tiuj pensoj iĝis tra mia kapo. Ili ŝajnis esplorindaj al mi. Kaj strange, apenaŭ mi estis dediĉitaj al ili, mi irĉesigis mian ĉevalon kaj mansignis al la aliaj ankaŭ halti. Fakte mi vidis spuron. Mi deĉevaliĝis pro ekzameni ĝin. Ĝi estis farita de du ĉevaloj, kiuj ne estis venintaj laŭ la sama vojo kiel ni, sed de dekstre malsupren de la alteco, fakte maksimume antaŭ unu horo. Do tieis du rajdantoj, kiuj estis estintaj tie antaŭ ni. Kiuj ili estis, tion mi ne povis ekscii per la spuro, sed ĉiukaze estis indianoj. Mi prenis mian revolveron el la poŝo. Ni plurajdis, sed malrapide kaj gardiĝe, tiel senbrue kiel eble, ĉiam unu post la alia, mi antaŭe. Ni sekvis la spurojn, kiuj estis tre klare videblaj en la mola, de la altaĵoj malsupren lavita tero. Ili kondukis laŭ la rivero, tra la arbedoj, al la malantaŭa parto de la valkaserolo.

„Ili rajdas al la kavo“, Intŝu-inta diris. „Ili do konas ĝin!“

„Fakte tiel bone“, mi aligis, „ke ili venis rekte trans la sovaĝaj antaŭmontoj kaj tamen trovis ĝin. Iliaj konoj do estas eĉ pli detalaj ol viaj.“

Ni proksimiĝis al la finaĵo de la valo. Ĝi finiĝis tie, kie la rivereto eliĝis rekte el la interno de la monto. Malfermaĵo enkondukis. Ĝi estis trioble pli vasta ol la rivereto kaj nur tiel alte, ke rajdanto povis eniĝi sen devi kliniĝi. Tiu estis la eniro al la granda kavo, kiun ni volis ekkoni. Antaŭ tiu eniro estis malgranda, libera spaco kiu estis kovrita de la malsupren falintaj ŝtonaroj, kaj tial estis sen verdaĵoj. Alveninte je la rando de tiu placo ni haltis, ĉar nun ni ekvidis la du rajdantojn, kiujn ni serĉis. Ili estis deĉevaliĝintaj kaj kuŝis kun la ventro sur la tero, kun la kapo klinigita super iu blankaĵo, kiu ŝajnis esti papero aŭ simila aĵo. Iliaj ĉevaloj mordadis je la lastjaraj branĉoj de la arbedoj. La du seloj kuŝis en la proksimo, kune kelkaj poŝoj kaj pakoj, ankaŭ la pafiloj.

Ni deĉevaliĝis kaj kondukis niajn ĉevalojn malantaŭen kelkan distancon pro alligi ilin tie, alikaze ni povis esti perfidataj per ili. Tiam ni reeniris al la arbeda rando pro observi la du virojn.

„Ĉu vi konas ilin?“ mi demandis la Koretinjon.

„Ne“, ŝi respondis.

„Sed vi vidis ilin!“

„Ne, certe ne!“

„Sed jes! Eĉ plurajn horojn!“

„Kie?“

„En la ‚Domo de la Morto‘, dum la interkonsilado de la ĉefoj. Estas la du medicinistoj de la kajovajoj kaj de la komanĉoj, kiuj malfermis la altaron.“

„Via okulo estas pli akra ol mia. Mi vidis ilin nur en la flagranta lumo de la fajroj.“

„Mi ankaŭ. Sed la okcidentulo antaŭ ĉio klopodiĝas laŭeble detale parkerigi la trajtojn de tiuj, kiuj ŝajnas grave al li. Vi ne spertas pri tio. La papero, per kiu ili okupiĝas, ne povas esti ajn kutima. Ŝajnas al mi, ke estas mapo aŭ iu simila. Ili irigas iliajn fingrojn sur ĝi, forte, kvazaŭ ili kverelus. Ili parolas dum tio tiel laŭte, ke oni ja povas preskaŭ aŭdi ĝin eĉ tie ĉi ĉe ni. Mi kaŝiros al ili pro aŭskulti ilin.“

„Ĉu mi kune?“

„Ne, kara Koretinjo“, mi ridis. „Kiun lingvon vi volas aŭskulti? Kaj via kaŝa alirado ja certe realiĝus sufiĉe laŭte.“

„Domaĝe! Mi ŝate volas kunagi! Kio nun, se ili volos murdi vin? Ĉu mortpafi, mortbati aŭ mortpiki?“

„Tiukaze vi rapide venu pro helpi al mi!“

„Tion mi rajtas, ĉu?“

„Jes, tion vi rajtas! Vi eĉ rajtas krei, vokegi kaj hurli, ajn tree kaj ajn multe kiel vi volas!“

„Do iru! Mi eĉ venos ĉiukaze!“

Mi donis la necesajn ordonojn al Pappermann kaj Intŝu-inta, kaj tiam paŝis inter la arbedojn pro kaŝe iri al la indianoj. Tio ne malfacilis al mi, ĉar ili estis tiel ege okupitaj per ili mem, ke ili ŝajnis havi nek okulojn nek orelojn por io alia. Mi venis tiel proksime al ili, ke mi estus de la arbedo, kiu kaŝis min, povinta ekpreni per la mano la piedon de sur la ventro kuŝanta kajovajo. La temo, kiun ili traktis, estis plej grava, ne nur al ili, sed same ankaŭ al mi.

Tio, kion mi estis supozinta esti papero, ne estis papero, sed ledo, silkmaldika pergamentece farita ledaĵo, surskribita sur ambaŭ flankoj aŭ eble ankaŭ surpentrita. Unu flanko surhavis detalan desegnaĵon de la Mount Winnetou kaj la situskizon de la ‚kastelo‘, en kiu loĝis la ‚Tenanto de la Granda Medicino‘. Sur la alia flanko estis same detala mapo de la interno de la granda kavo, antaŭ kiu ni troviĝis. Tion mi sciis jam post la paŝiĝo de la unua minuto, dum kiu mi kaŝaŭskultis. Li interparolado estis tre emocie. La mapo estis turnata jen kaj reen. Oni eldiris, serĉis kaj trovis la diversajn nomojn, lokojn kaj punktojn. Ĉi ĉion mi aŭdis kaj memortenis. Mi eksciis, ke la mapo estis posedaĵo de la medicinisto de la komanĉoj. Ĝi estis prae malnova heredaĵo de lia familio. Neniu escepte de li rajtis scii pri ĝi, kaj nur la eminenta, plej grava celo, kiu estis sukcesenda hodiaŭ kaj tie ĉi estis iginta lin malkaŝi tiun sekreton. La medicinisto de la kajovajoj estis eksternorme avida detale ekkoni kaj memorteni la enhavon de tiu leda dokumento.

„Do vere estas tiel, kiel ĝi estas skribata tie ĉi, ĉu?“ li demandis.

„Jes, vere!“ la komanĉo kapjesis.

„Ni nun estas tie ĉi, ĉe tiu ĉi loko, ĉu?“

Dum tio li montris al la rilata punkto de la mapo.

„Jes“, la alia respondis.

„Kaj de tie ĉi oni povas iri subtere ĝis la Mount Winnetou, ĉu? Kaj ne nur iri, sed ankaŭ rajdi, ĉu?“

„Certe.“

„Kaj laŭ tiu vojo vi volas konduki nin kaj niajn kvarmil militistojn supren pro ataki Tatela-sata:n kaj lian tutan anaron, ĉu? *Uf, uf!* Tio estas eminenta plano, tre eminenta plano! Ĉu mia ruĝa frato jam iam iris laŭ tiu vojo? Ĉu li iam estis supre?“

„Ne, sed unu el miaj prauloj kaŝe provis ĝin, kaj kun sukceso. La vojo finiĝas je pluraj lokoj; estis eble al li atingi la finaĵon, kiun ankaŭ volas atingi mi.“

„Tiu estas malantaŭ la vuala falo, ĉu?“

„Jes. Tiu estas la sola punkto, kiun oni povas atingi surĉevalo. Al la aliaj punktoj oni nur povas iri piede.“

„Sed kio, se ne sukcesos? Se pli ol kvarmil homoj estas en la kavoj sen kapabli moviĝi nek antaŭen nek malantaŭen? Pripensu, mia frato, kiom bezonas tiom multaj homoj kaj tiom multaj ĉevaloj!“

„Mi pripensis tion. Mi tial antaŭenrajdis pro esplori la kavon antaŭe. Kaj pro tio mi kunprenis nur vin, mian ruĝan fraton, kaj neniun alian, ĉar vi same estas tenanto de la medicinoj kiel mi kaj Tatela-sata. Pri vi mi povas fidi.“

„Do ni ne perdu tempon, sed komencu!“

Li stariĝis.

Ili do ne estis kverelintaj, sed per ilia emocio estis nur ŝajnintaj tiel. La komanĉo ankaŭ leviĝis de la tero. Li kunfaldis la mapon prizorge kaj malrapide, pro enpoŝigi ĝin tiam. Tiam ankaŭ mi rektiĝis, elpaŝis de malantaŭ la branĉaro kaj diris:

„Miaj ruĝaj fratoj verŝajne kvankam perdos iom da tempo, antaŭ ili komencos!“

„Uf!“ la kajovajo vokis ektimigite. „Blankulo!“

„Uf, uf! Palvizaĝo!“ vokis je la sama tempo ankaŭ la komanĉo.

Mi ŝiris la pergamenton el lia mano, metis ĝin en mian poŝon, starigis min tiel, ke ili ne povis atingi iliajn pafilojn, kaj pluis:

„Mi prenas tiun mapon intertempe al mi, ĉar mi helpas al vi trovi la tie priskribitan vojon tra la kavoj!“

Nun ili resaniĝis de ilia surpriziĝo. Ili rektiĝis bataloprete.

„Kiu estas vi, ke vi riskas ŝteli de mi?“ la komanĉo demandis.

Dum tio li proksimiĝis al mi pro atingi sian pafilon. Mi elzonigis la revolveron, streĉis ĝin kaj respondis:

„Mi ne ŝtelas! Se tiu karto estas via laŭleĝa posedaĵo, vi rericivos ĝin. Foriĝu de la pafiloj, alikaze mi pafos! Mi ne estas sole!“

Mi mansignis. Venis Pappermann, Intŝu-inta kaj la Winnetou:oj, la Koretinjo malrapide de malantaŭe.

„Uf, uf!“ la kajovajo vokis, kiam li ekvidis Pappermann:on. „Duona, blua vizaĝo!“

„Kaj blanka *squaw*!“ la komanĉo aligis, nun vere ektimigita.

„Vi aŭdis pri tiu blua vizaĝo kaj pri tiu *squaw*. Do kiu estas mi?“ mi demandis.

„Old Shatterhand!“ la komanĉo respondis.

„Old Shatterhand!“ ankaŭ la kajovajo vokis. „Nia malamiko, nia plej ega malamiko!“

„Tio estas mensogo! Mi estas malamiko de neniuj homoj. Jes, mi eĉ povis pli bone esti la malamiko de blankulo ol tiu de ruĝulo! Demandu viajn ĉefojn, kiel mi indulgis pri ili! Demandu viajn maljunajn militistojn, ĉu ili aŭdis vorton de malamo de mi, aŭ ĉu ili povas rakonti pri nur unu sola ago de venĝiĝo de mi! Mi amas ĉiujn homojn, kaj mi amas ankaŭ vin. Mi volas vian feliĉon kaj tial iĝos kontraŭ ĉiuj viaj intencoj kiu kondukos vin en malfeliĉon. Unu tia intenco estas tiu, kiun vi havas hodiaŭ. Mi ne toleras, ke ĝi efikiĝos. Residiĝu kaj eldonu viajn tranĉilojn. Vi estas kaptitaj!“

„Ni ne estas kaptitaj, sed —“

Kun tiuj vortoj la komanĉo saltis al mi, sed mi cedis paŝon dekstren, ekprenis lin je la flanko kaj ĵetis lin sur la teron. Intŝu-inta, la grandulo, genuiĝis sur lian bruston kaj subigis lin sen ĉia peno. Same la brava, maljuna Pappermann agis pri la kajovajo. Post plej mallonga tempo la du kaptitoj estis tiel katenitaj, ke ili ne plu povis moviĝi. Ni sid-iĝis ĉe ili sur la teron. La Winnetou:oj alkondukis niajn ĉevalojn. Sed mi antaŭ ĉio reel-poŝigis la mapon kaj disfaldis ĝin pro rigardi ĝin pli detale. Jam kiam mi faris la unuan vidon al ĝi, mi sciis, kion mi devis pensi. Mi turniĝis al la komanĉo:

„Avat-tovav, la medicinisto de la komanĉoj diru al mi, ĉu li posedas grandan kolekton da libroj, do bibliotekon.“

„Mi posedas ne“, li respondis. „Ne estas iu ĉe ĉiuj viroj de la komanĉoj.“

„Ĉu Avat-tovav eble scias, kie estas unu?“

„Tie ĉi ĉe la Mount Winnetou, ĉe Tatela-sata.“

„Ĉu nenie alie?“

„Mi ne konas alian.“

„Tiukaze vi ne ricevos tiun mapon. Mi devas porti ĝin al ĝia laŭleĝa posedanto. Ĝi estas la posedaĵo de Tatela-sata. Ĝi estis ŝtelita de li.“

„Tio estas mensogo!“ la medicinisto ekkoleris.

„Ne estas mensogo, sed la vereco.“

„Pruvu tion!“

„Tuj! Vi nur verŝajne ne posedas la konojn, kiuj necesas pro kompreni kion mi diras. Tiu mapo estas numerita, fakte en la pokomĉio-dialekto de la majaa lingvo. Tie sube, en tiu ĉi angulo estas la centoj: *Jo-tuk*: tio signifas kvinoble dudek; tio signifas do cent. Kaj tie ĉi en la alia angulo estas la dekonoj kaj unuonoj: *vuk-laj*; tio signifas sep kaj dek, do dek sep. Tiu ĉi mapo do estas numero cent dek sep de la rilata biblioteko aŭ unu el iliaj sekcioj. Mi montros ĝin al Tatela-sata, kaj evidentigos, ke ili apartenas al li.“

„Vi ne montru ajn ion al li, kaj nenio apartenu al li! Tiu mapo ja fakte estis ŝtelita, sed nur nun de vi! Vi estas la ŝtelisto!“

„Silentu, alikaze vi ricevos frapon sur la buŝaĉon, olda fiulo!“ Pappermann interrompis lin. „Kie estas la fratoj Enters?“

Tio ne estis malbona ruzaĵo, ke li enaferigis tiun nomon. La du ruĝuloj ekkonis per tio en plej komforta maniero, ke ni ne estis tiel nenionsciantaj, kiel ili verŝajne supozis. Ili ne tute povis kaŝi ilian surpriziĝon, sed ili rapide ekregiĝis, kaj la komanĉo demandis en indifera sono:

„Enters, ĉu? Kiu estas tiu?“

„Estas la du fratoj, kiuj promesis elliveri nin al vi. Nun vi scias sufiĉe pro esti konvinkitaj, ke ni tute ne havas kaŭzon kaj tute ne emon volvi vin en veluraĵon aŭ silkaĵon. Diru nur unu vorton plu, kiu ne plaĉas al ni, kaj vi ricevos batojn!“

Ja estus estinta pli bone, se Pappermann estus lasinta paroli min; sed hodiaŭ estis post liaj eksaj jaroj la unua fojo post longa, longa tempo, ke li denove havis kaptitojn sub sia forto, kaj tial mi ŝate malenviis al la maljuna, brava ulo la facile fordoneblan kontentigon iomete roli kiel heroo. La du medicinistoj ekde nun silentis. La nomo Enters pensigis ilin.

Unue ni devis manĝi. La Koretinjo do elpakis la kunportitajn manĝaĵojn kaj disdonis ilin al ni. La seloj estis demetataj de la ĉevaloj. Ili rajtis trinki kaj tiam serĉi ilian verdan paŝtigajon. Al mi la mapo memkompreneble pli gravis ol la manĝado. Mi studis ĝin detale kaj petis la konsilon de Intŝu-inta dum tio, kiu estis asertinta al mi, ke li detale konis la kavon. Evidentiĝis kontraŭdiro inter li kaj la mapo. Laŭ tiu estis tie ĉi malsupre en la valo fakte nur tiu unu sola eniro al la kavo, antaŭ kiu ni troviĝis, supre je la altaĵo sed tri diversaj eniroj, du vastaj kaj unu vasta. La vasta estis la ĉevalvojo, kiu finiĝis malantaŭ la vuala falo. La du aliaj estis piedvojoj, kiuj deflankiĝis je certa loko de la ĉevalvojo, ankoraŭ plukondukis kune je distanco, kaj tiam disiĝis. Unu finiĝis supre ĉe la kastelo; je kiu loko, tion oni ne povis diri; pro difini tion detale la desegnaĵo estis tro malgranda. La alia kondukis ne same alten. Ĝi finiĝis en la interna valo; laŭŝajne en la proksimo de la komencita giganta statuo de Winnetou aŭ ĉe unu el la du diablaj katedroj. Sed Intŝu-inta konis neniun el tiuj tri eliroj. Li ja sciis, ke pli malantaŭe, en praa tempoj, ekzistis pluraj elfiniĝoj de la kavo, sed oni estis plenŝutinta ilin. Kial, tion li ne sciis. Li konstatis, ke la kavovojo, ĉiam vaste kaj ĉiam bone laŭireble, kondukis supren en la internon de la monto, ĝis ĝi subite malvastiĝis kaj tiam finiĝis je gutŝtonaro. Tiu gutŝtonaro estis iom flanke antaŭ la vuala falo, kiun oni eĉ povis aŭdi fali en la kavo, se oni havis akrajn orelojn.

Kiu nun pravis? Ĉu Intŝu-inta aŭ la mapo? Ĉiukaze la mapo. Mi do decidis fidi pri ĝi, almenaŭ rilate al la pli supra parto de la kavo kaj la tie troviĝantaj eliroj. Sed ĝis tie mi povis plene fidi pri la lokokonoj de la ‚servisto‘. Tial mi decidis ne lasi la ĉevalojn tie ĉi, sed kunpreni ilin. Ni estis supozintaj, ke ni devis reeniri al la eniro; sed se ekzistis supre tiel vasta kaj komforta eliro, kiel ĝi estis registrita sur la mapo, ni ja tie troviĝus jam hejme kaj ne necesis fari la reeniradon tra la kavo, kaj rajdi tiam kvin horojn plu hejmen. Intŝu-inta ja insistis, ke ni, ankaŭ pro la ĉevaloj, estis necese devigotaj returniĝi; sed mi havis la opinion, ke tute neniue estus ekhavinta la ideon komplete plenŝuti la tri elirojn. Mi des pli supozis, ke ili nur estis maskitaj, do kaŝitaj, kaj fidis je tio pri mia trovkapablo kaj pri miaj bonaj okuloj.

Tuj post la manĝado ni pretiĝis pro la traesploro de la kavo. Ni estis mem kunportintaj torĉojn kaj lumilojn, kaj kiam ni malfermis la pakaĵojn de la du kaptitoj, ni vidis, ke ankaŭ ili estis abunde provizitaj per tiuj aĵoj. Pro la humideco kaj malvarmeco ni estis kunprenintaj grandajn, maldikajn, sed akvorezistajn kovrotukojn, kiujn ni povis surmeti kiel mantelojn. La seloj estis remetataj sur la ĉevalojn, la medicinistoj fiksligataj sur iliajn ĉevalojn, kelkaj torĉoj bruligantaj, kaj tiam ni komencis la subteran rajdadon, de kiu mi ekspektis tiel bonajn sukcesojn, kvankam mi tute ne sciis, de kie ili devis veni.

Mi bezonus plurajn presfoliojn pro nur pli-malpli priskribi la internon de tiu belega kavo, sed mi povas limiĝi tie ĉi al nur malmultaj lineoj, ĉar estos ebleco al mi pli poste priskribi ĝin sufiĉe detale. Ĝi estas menciata ofte en la testamento de Winnetou kaj tie estas scenejo de okazaĵoj, pri kiuj mi devas nun ankoraŭ silenti. Ni rajdis tra vere belega submondo. Antaŭe Intŝu-inta kun unu Winnetou kiel torĉtenanto, malantaŭ ili mi kaj la Koretinjo, post ni la kaptitoj, tiam Pappermann kun la aliaj Winnetou:oj, el kiu unu portis la duan torĉon. Kie necesis, ni bruligis por ni ankaŭ kandelojn krom la torĉoj.

La vojo kondukis senĉese supren, fakte ofte sufiĉe krute. La kavo eĉ je iliaj plej malaltaj ejoj tiel altis, ke ni nenie devis iĝi de la ĉevaloj. Neniu sola el la subteraj ĉambregoj, tra kiuj ni venis, similis al alia. Sekvis diverseco post diverseco, surprizo post surprizo. Ofte la surprizo estis tiel ege, ke ni ne povis eviti laŭtajn elvokojn de admiro. Estis regno de plej belegaj gutŝtonaj fabelaĵoj, kiun ni ekkonis tie. La plej grandiozaj pensoj, rigidiĝintaj al spato, aragonito kaj sintro, kreskis malsupren kiel stalaktitoj. Same belegaj stalagmitoj altiĝis renkonte al ili de malsupre pro unuiĝi kun ili al fajfiloj, kolonoj, orgenoj kaj aliaj formiĝoj, pri kiuj oni povis apenaŭ pensi, ke la naturo estis kreinta ilin. Ni sed ne havis sufiĉan tempon pro detala rigardo, kiun ni devis prokrasti ĝis pli poste. Urĝiĝis nin antaŭen, supren al la loko, kie devis decidiĝi ĉu ni povis pluiiri aŭ ne. Tiel ni rajdadis tra koridoroj kaj tuneloj, tra malgrandaj ĉambroj kaj grandegaj ĉambregoj, tra refektorioj kaj preĝejoj, tra antaŭkorto kaj vastaj kolonaj haloj, tra verandoj kaj koridoroj. Ni preterpasis abismojn, en kies profundo la rivero bruas. Ni iĝis inter malvastaj akvofadenoj, kiuj ŝprucis el nevideblaj ĝardenaj tuboj. Ni pasis lokojn, kie ŝajne pluis. Ni vidis kaskadojn fali kaj akvoradiojn falegi el nevideblaj tegmentaj defluiloj. Sed ni ne restis, ĝis finfine la vasta vojo finiĝis. Subite ĝi tiel malvastiĝis kaj nekomfortiĝis, ke nur piedirantoj povis antaŭeniĝi plu.

„Vi vidas, ke mi pravis“, Intŝu-inta diris. „La vojo por ĉevaloj estas je la fino. Ĝi ne kondukas plu. Ne estas finiĝo, kiu formigas elirejon malantaŭ la vuala falo.“

Ŝajne li pravus. Ni troviĝis en vasta koridoro, kiu ĉesis je duobla grupo de stalaktitoj kaj stalagmitoj, kaj tiam deflankiĝis kiel malvasta vojo de tiu grupo dekstren. Sed laŭ la mapo ĝi faris tiun deflankiĝon ne, sed ĝi pluiris rekte, post ĝi estis flankeniĝinta de la malvasta vojeto. Tiu estis la decidiga punkto! Nun devis evidentiĝi, ĉu mi povis fidi pri miaj okuloj kaj pri mia konkludkapablo aŭ ne! Mi komencis esplori la gutŝtonajn grupojn, kaj rimarkis tre baldaŭ, ke tute ne necesis egan sagacecon pro ek trovi la ĝustan.

Stalaktitoj estas gutŝtonoj, kiuj kreskiĝas de supre, do de la plafono. Sed per stalagmitoj oni komprenas gutŝtonojn, kiuj kreskiĝas de la tero supren. Kiam ambaŭ kuniĝas en la mezo, ili iom post iom formigas kolonojn kaj kolonarojn. La stalagmitoj kreiĝas alimaniere kiel stalaktitoj. Ambaŭ estas tre facile disigiĝi de la aliaj, ĉar ili ne posedas la saman strukturon. Tie ĉi mi nun vidis tuj, ke la de supre pedantaj stalaktitoj estis veraj; sed la de malsupre altiĝantaj veris ne; ili estis stalaktitoj, ne stalagmitoj. Ili ne estis kreiĝintaj tie ĉi ĉe tiu loko, sed oni estis alportinta ilin tien kaj kunmetis ilin. Kial kaj pro kio? Tre simple: Pro ĉesigi la vastan vojon, pro maski ĝin, pro kaŝi, tute tiel, kiel mi estis supozinta.

Mi skuetis la plej eksteran de tiuj ŝtonoj, ĝi moviĝeblis. Mi flankeniĝis ĝin. Pro fari tion mi estis deĉevaliĝinta. La aliaj agis laŭ tiu ekzemplo kaj helpis forigi ankaŭ la sekvajn ŝtonojn. Per tio jam post mallonga tempo la vasta vojo almenaŭ estis tiel liberigita, ke ni povis konvinkiĝi pri ĝia plukonduko. Ni pligrandigis la truon, ĝis homo povis trairi. Tiam mi postulis al Pappermann kaj unu el la torĉoportantaj Winnetou-oj sekvi min en la breĉon. Mi volis vidi, kio estis malantaŭe. La aliaj devis atendi kaj intertempe forigi tiom da ŝtonoj, ke ankaŭ ĉevaloj povis trapasi.

Ni tri prenis, krom la unu, brulanta torĉo ankaŭ duan kiel rezervo, kaj tiam antaŭeniĝis plu, memkopreneble piedire. Baldaŭ ni aŭdis muĝon antaŭ ni, tiam muĝegon, tute

kiel en la pleja proksimo al la Niagara falo. Tiu bruego kaj muĝego estiĝis tiel forte, ke ni ne plu aŭdis niajn proprajn vortojn. La muro je nia dekstra ĉiam pli malaltiĝis malsupren, la alia restis. De supre krepuskis, kvazaŭ la tago vidis malsupren al ni tra dika lakta vitraĵo. Kaj subite, post kurbo de la vojo ni vidis ĝin muĝege fali malsupren, la vualan falon, en la submondon, en kiu ĝi formiĝis al la rivereto, laŭ kiu ni estis antaŭe rajdintaj al la altaĵo. Blovis tiel ega vento, ke ni devis fikstani la ĉapelojn. Ni paŝis kiel sur roka strato de Svisujo. Je unu flanko la rokmuro, je la alia la osceda abismo, en kiun la akvofalo malaperis. Neniu apogrelo protektis nin. Sed la vojo estis tiel firme kaj vaste ke kvar ĉevaloj povis iri tie flanke de la alia. Tiel ni pasis la akvofalon laŭ ĝia tuta vasteco, ĝis ni estis tute preter ĝi, la supra lumo malaperis, kaj ni devis ree nur fidi pri la lumo de nia torĉo. Post tio estis tra supreniĝanta galerio, kiu ne iris rekte, sed kurbite. Tie ĉi denove aŭdeblis la sono de la falo. Ĝi ĉiam kaj ĉiam pli laŭtiĝis, kaj kiam ĝi estis estinta tiel forte, ke ĝi preskaŭ surdigis nin, ni revidis la brilon de la tago, sed ne de supre, sed antaŭe. Ni iris al tie kaj malmultajn momentojn poste staris en la libero. Aŭ plie ne vere en la libero, sed inter la muĝega amasaĵo de la vuala falo kaj la alteniĝanta roko, de kiu ĝi falis. Ni staris dense apud la abismo, en kiun ĝi malaperis. Tie malsupre ni ĵus preterpasis. Ni estis en ekzakte la sama pozicio kiel la vizitantoj, kiuj lasas sin konduki malantaŭ la malsupren faleganta ondomuro, pro poste povi paroli pri tio. Oni bezonis nur iri inter roko kaj akvo al la plej ekstera fino de la falo, pro atingi la firman, malsekan teron tra tie troviĝanta densa verdaĵaro.

Mi nun sciis sufiĉe. Ni do reeniris al la loko, kie troviĝis niaj kunuloj. Kiam ni alvenis tie, ili ne jam estis finigintaj ilian laboron. La forigendaj ŝtonoj havis tian pezegon, ke necesis longa tempo pro forigi ilin. Tion mi uzis pro kroma esploro. Mi volis nun ankaŭ scii, kien la malvasta vojo kondukis nin. Pro tio mi ne lasis min akompani ne de Pappermann, sed de Intŝu-inta kaj torĉoportanto. La Koretinjo petis rajti kuniri, kaj mi akceptis, kvankam ŝia ĉeesto ne povis faciligi, sed nur malfaciligi la serĉadon al ni.

Mi kalkulumis, ke ni tie ĉi troviĝis preskaŭ ekzakte sub la loko, je kiu tie supre la pezega Winnetou-statuo komencis leviĝi dum la konstruado. De tie ĉi ĝis la loko, kie la malvasta vojo laŭ la mapo disiĝis en du pli malvastajn plu, tute ne estis malproksime. Kiam ni alvenis tie, mi tuj vidis, ke tie ĉi estis denove stalaktitoj anstataŭ stalagmitoj. Oni estis maskinta do ankaŭ tie. Intŝu-inta rimarkis nenion. Li ne ĉesiris. Li ne antaŭsentis, ke tie ĉi deflankiĝis unu el la pli malvastaj vojoj, kaj pluiris kune kun la torĉoportanto. Mi sekvis ilin sen diri ion. La vojo, kiun ili maltrafis ĉiukaze estis tiu, kiu finiĝis ĉe la diablaj katedroj. Sed tiun mi volis ŝpari al mi por mi mem. La plua vojo kondukis laŭ la mapo supren al la kastelo, kaj tiun mi estis ekkonanta tre ŝate ankoraŭ hodiaŭ. Ni tial iris laŭ la malvasta vojo tiel longe, ĝis ĝi ŝajnis finiĝi.

„Tie ĝi finiĝas“, Intŝu-inta diris, dum li haltis.

„Kaj ne kondukas plu, ĉu?“ mi demandis.

„Ne. Ekzakte kiel antaŭe!“

„Jes. Ekzakte kiel antaŭe! Kiam oni formetas la ŝtonojn, kiuj maskas ĝin, oni tuj vidas, ke ĝi ne estas je la fino, sed pludaŭriĝas malantaŭ la ŝtonoj. Ni forigu ilin!“

Tiuj stalaktitoj ne estis pezaj. Mi levis kelkajn el ili flanken. Intŝu-inta helpis. Kion mi estis pensinta, tio montriĝis: la vojo plukondukis. Tie ĉi necesis grimpi trans ili. Tiam nenio malhelpis al ni pluiri. Ni faris tion. Sed ekde tie la gutŝtonoj ĉesis. Estis plu nur kavoj sen sintroformiĝoj. Kaj estis ĉiam unu pli alte ol la alia. Oni devis grimpi. Fine tiu formiĝo de naturaj kavaĵoj ĉesis, kaj ni iris supren inter rokaj fendoj, trans home faritaj ŝtupoj kaj koridoroj, kiuj estis supermuritaj. Dum tio la aero estis ekster-norme malhumide kaj pure. Mi ne estis vidinta al la horloĝo, kaj ankaŭ ne nombrinta nek la ŝtupojn nek niajn paŝojn; sed estis al mi, kvazaŭ ni estis suprenirintaj multe pli ol kvarona horo; tiam la ŝtupoj subite ĉesis. Ni ne povis pluiri. Ni troviĝis sur malvasta, ŝtona ŝtuparo. Sub ni la ŝtupoj, dekstre muro, maldekstre muro, super ni muro. Nenie pordo, fenestro, malfermaĵo! Kiel eliĝi tie?

Ĵus super la lasta, plej alta ŝtupo estis metita ŝtonplato. Ĝi ne povis esti peze, ĉar ĝi estis maksimume tri spanojn grande en kvadrato. Mi provis levi ĝin. Ne eblis. Ĝi havis du kavetaĵojn, kiuj ĉiukaze ne estis enmetitaj sen intenco. Mi povis enmeti la tenilon de mia tranĉilo. Per tio mi ekhavis tenilon pro forŝovi la platon. Mi provis tion antaŭ-en, malantaŭ-en, dekstren — vane. Sed maldekstren ĝi finfine moviĝis. Mi havis la senton, kvazaŭ ĝi estis sur rutiloj. Ekestis super mi kvarangula malfermaĵo, tra kiu mi povis grimpi. Mi sed ne tuj faris tion, sed estis tiel gardiĝe enmeti mian kapon nur ĝis la okuloj. Kion mi vidis?

Tre altan, okangulan muritan ĉambron kun du pordoj. La muroj estis plene surkreskitaj per pasifloroj, kies volvobranĉoj iĝis ĝis supren al la plafono, kie ĉie ĉirkaŭe estis multenombraj malfermaĵoj pro enlasi la necesan lumon. La volvobranĉoj estis tiel densaj, ke oni ne povis vidi ion de la suba muro. Ili verdis kaj floris, fakte preskaŭ superabunde. Ke tio okazis ankoraŭ nun, en la sufiĉe malfrua sezono, certe estis konsekvenco de la altaĵa situo, kaj ankaŭ de la fakto, ke la vegetaro ne okazis en la libero, sed estis limigita al la interno de fermita spaco. La pasifloro havas konate pli ol du cent specojn, sed tie ĉi nur du estis reprezentitaj. La fakta supraĵo kovraĵo estis formigata de *Passiflora quadrangularis*, kies pompfloroj, interne rozkoloro nuancita, havis diametron de dek centimetroj. Tio ĉirkaŭe konsekvencis flora pompego sen komparo. De tiu subaĵo eminentiĝis sur unu muro komplete blanke floranta *Passiflora incarnata*, kiu estis tiel kreskigite kaj tranĉite, ke ĝi formis kvar metrojn altan, rekte starantan krucon, tute evidenta signo de la kristaneco, tie ĉi je tiu al mi fremda, sekreto plena loko. Vidalvide de mi estis pordo, kiu estis malfermita. Kaj tie, kie mi troviĝis, ankaŭ ŝajnis esti pordo, mi nur ne povis vidi ĝin, antaŭ ke mi leviĝis pli alten kaj tiam eliĝis el la malfermaĵo. Tiam evidentiĝis, ke tie ĉi je nia flanko de la pasiflora ĉambro pluraj ŝtupoj kondukis al eliro, kiu estis fermita per riglilo. Mi paŝis supren, deŝovis la riglilon kaj malfermis. Tiam mi staris ekstere en la libero, sed ne donis la tempon al mi difini la lokon, je kiu mi troviĝis, sed refermis la pordon, repaŝis malsupren laŭ la ŝtupoj kaj postulis al Intŝu-inta suprenveni kaj diri al mi, ĉu li sciis, kie ni estis. Apenaŭ, ke li vidis la ĉambron, li mirigite elvokis:

„Uŝ! Tiu estas la florkapelo, en kiu Tatela-sata kutimas preĝi!“

„Al kiu li preĝas tie ĉi?“

„Al la granda, bona Manitou. Al kiu alie?“

„Sed tie ja estas la kruco, la simbolo de la kristaneco!“

„Tiu estis farita de Winnetou. Li plantis ĝin. Li diris, ke tiu estas la signo de sia frato Old Shatterhand. Li ne jam komprenis ĝin, sed li lernos kompreni ĝin, des pli alten ĝi kreskus tie ĉi. Tiel li amis vin, tiel senlime li amis lin!“

Oni ja povas facile pensi, kiel profunde tio tuŝis mian koron! Sed mi devis rapide venki tiun kortuŝon kaj demandis plu:

„Kien kondukas la pordo, kiu estas tie vidalvide al ni?“

„Al la dormejo de Tatela-sata.“

„Kaj tiu ĉi super la ŝtupoj, ĉu?“

„Eksteren sur la monton. Neniu estis antaŭpensinta, ke krome ekzistas klappordo, tra kiu ni nun estis venintaj!“

La fermilo de tiu klappordo konsistis el la plato, kiun mi nun estis foriginta de ĝia loko. Inter la terŝtonoj ĝi estis tiu, kiu iĝis de la flanko ĵus al la plej malsupra ŝtupo, en kiun, ĉar ĝi obtuzis, estis ŝovebla. Per ke mi estis farinta tion, la klappordo estis malfermita. Mi nur devis reŝovi ĝin en ĝian eksan pozicion, kaj ĝi estis refermita.

Nun ankaŭ la Koretinjo suprengrimpis kun la torĉoportanto. Per la ekvido al la multenombraj pasifloroj ŝi faris ekvokon de admiro. Tie malsupre en la koridoro ŝi ne estis aŭdinta, kio estis dirita al mi de Intŝu-inta. Tamen ŝi tuj ekdivenis la destinon de tiu ĉi ĉambro.

„Tiu estas ĉambro pro preĝado!“

Kun tiuj vortoj ŝi paŝis al la mezo de la ĉambro. Tie estis benko, kiu estis kovrita per felajo. Ŝi sidiĝis sur ĝin, ĵus vidalvide al la kruco, kaj pluparolis:

„Tie ĉi sidas Tatela-sata pro interparoli kun Dio, lia sola estro. Li havas la krucon antaŭ si, la monda mizeron, kiu savas la solan homon kaj tutajn popolojn. Tie li preĝas pro la savo de sia raso. Tie ĉi mi volas sidi kaj preĝi kun li, ke la sinjoro Dio aŭdu lin!“

„Faru tion!“ mi respondis. „Ni nun reeniras, sed baldaŭ revenos.“

„Ĉu tien ĉi?“ ŝi demandis. „Kiam?“

„Eble jam post duona horo. Mi reeniros en la submondon pro alporti la du kaptitojn en la kastelon laŭ tiu kaŝita vojo. Tiel neniu homo vidos ilin escepte de ni. Mi deziras, ke neniu de iliaj anoj kaj samfamilianoj ekscios, kie ili troviĝas. Ne havas senc-on, ke vi reensekvas nin en la kavon. Vi ja tamen devus reenveni tien ĉi supren kun ni.“

„Bone, do mi restas. Sed kion mi faru, kiam iu ektrovas min tie ĉi?“

„Vi estos traktata kiel amikino, egale kiu li estos. Cetere tute ne necesas, ke vi lasas ek trovi vin. Vi devas iri nur supren laŭ tiuj ŝtupoj kaj en la liberon, tiel vi restos nevidata. Certe ekideos al neniu kontroli, ĉu la pordo estas apogita aŭ ne.“

„Jes, ĝuste! Do, mi atendas tie ĉi.“

Ŝi residiĝis sur la benkon. Sed ni aliaj grimpis malsupren laŭ la koridoro. Ni ne lasis ĝin malfermite, sed mi ririglis ĝin per la ŝtonplato. Tiam ni reeniris al la loko, kie niaj kunuloj atendis nin. Pri ilia laboro forigi la stalaktitojn, ili estis preskaŭ je la fino. Mi sidiĝis pro atendi dum la malmultaj minutoj. Kiam mi sidis senmove mi sentis, ke gutis de la plafono sur min. Sed ne estis akvo, sed disfrotitaj ŝtoneroj. Ili fluis kiel faruno aŭ

sablo malsupren sur min. Intertempe ankaŭ estis pizece, fabece aŭ nuksece granda peco. Mi vidis supren. La lumo de niaj torĉoj ne iĝis tute supren; tamen mi vidis ĵus super mi malvastan fendeton, el kiu pecetis. Tio en tia kavo ne estis eminentaĵo. Tial mi tute ne ekhavis la ideon esplori la kaŭzon de tiu fendeto.

Kiam la vasta vojo estis liberigita, mi diris, ke ni devis disiri. La du medicinistoj iru kun mi, Intŝu-inta kune kun torĉoportanto piedire grimpu supren. Sed la aliaj rajdis, kunprenante niajn nerajdatajn ĉevalojn, sub la estreco de Pappermann laŭ la ĵus de ni trovinta vojo, kiu finiĝis malantaŭ la vuala falo. De tie ili tuj turniĝu al la kastelo. Ni atendis, ĝis ili foris. Tiam mi metis bandaĝojn ĉirkaŭ la kapoj de la medicinistoj pro blindigi ilin, kaj malpermesis ĉian defendiĝon. Post tio mi ekprenis la brakon de la komanĉo, Intŝu-inta tiun de la kajovajo. La torĉoportanto paŝis antaŭe. Tiel ni grimpis laŭ la jam irinta vojo al la pasiflora ĉambro. Tio eblis, ĉar la okuloj de la kaptitoj estis ŝtopitaj, tiel malrapide, ke ni ne post duona horo, kiel mi estis dirinta, sed nur post plena horo alvenis supre ĉe la lastaj ŝtupoj. Tie mi ekiĝis flankenŝovi la platon. Dum mi faris tion, mi aŭdis voĉojn. Ŝajnis esti iu ĉe mia edzino. Mi malfermis la klappordon tiel sensone kiel eble. Tiam mi gardiĝe enŝovis nur la supran parton de mia kapo ĝis la okuloj elen pro vidi, kiu parolis tie. La Koretinjo estis malaperinta, ĉiukaze tra la ŝtupara pordo eksteren en la liberon. Nun Tatela-sata sidis sur la benko, vidalvide al la kruco. Ĉe li staris dek du apaĉaj ĉefoj en pli juna aĝo, el kiuj mi konis neniun. La plej maljuna el ili ne estis pli ol kvin dek jarojn aĝe. La maljuna ‚Tenanto de la Medicino‘ parolis per emocia voĉo al ili. Mi aŭdis la daŭrigon de la komencita parolado:

„Nia bona Manitou estas pli grande, milionojn pli grande ol la ruĝaj viroj pensis ĝis nun. Ili supozis, ke li estus nur ilia Dio, sed ne ankaŭ la Dio de ĉiuj aliaj, kiuj vivas. Se tiu estus laŭ la vereco, kiel malgrande li tiukaze estus, kiel malgrande! La Dio de kelkaj bedaŭrindaj indianaroj, kiuj estas frakasataj, dispremataj kaj piedbatataj de la palvizaĝoj! Kiel grande kaj kiel forte kontraŭe estu la Dio de la blankuloj! Kaj kiel ege ni do deziru, ke tiu Dio de la blankuloj anstataŭu la senfortan Manitou:n de la indianoj! Sed tiu deziro estis plenumita al ni, eĉ antaŭ ke ni sentis ĝin. Vidu jen al la kruco! Ĝi floras pro savi nin. Ĝi forprenas Manitou:n de ni, pro doni Mantiou:n al ni. Ĝi diras al ni, ke estas nur unu sola, la ĉionkapabla, la ĉionscianta, la omnipotenta, la ĉionpardonanto, kaj ke ni forrabas lian ĉionkapablon kaj ĉionamon, per ke ni volas havi lin nur por ni, por ni sole, kiuj ni estas la plej malfeliĉa el ĉiuj nacioj kaj la plej malforta el ĉiuj rasoj. La kruco estas en la tero kaj altiĝas al Dio. Tio estas la unua, kion ĝi signifas. Sed ĝi etendas ĝiajn du brakojn pro ĉirkaŭbrakumi ĉiun kaj la tutan mondon. Tio estas la alia, kion ĝi signifas. Neniu el ni sciis tion. Estis Old Shatterhand, kiu alportis tiun scion al ni. Sed ni ne akceptis ĝin. Estis nur unu sola, kies koron tuŝis tiu mesaĝo. Tiu sola estis Winnetou. Li observis; li ekzamenis. Li komencis kredi. Kaj ju pli firmiĝis tiu lia kredo, des pli ofte li venis al mi pro peti al mi, ĉu li rajtis planti tiujn pasiflorojn kaj tiun krucon en la plej favorata loko de miaj preĝadoj. Estis lia elkora deziro konduki Old Shatterhand:on al mi. Lia blanka frato devis vidi tie ĉi, ĉe tiu ĉi loko, kiel la kruca penso kaj la konvinkiĝo pri unu sola, granda Manitou radikiĝis en la koro de lia ruĝa frato, kaj evoluiĝis al floraĵo kaj abundaĵo. Mi kontraŭis. Mi malamis Old Shatterhand:on.

Tiam Winnetou foriris, kaj ne revenis. Sed kio vivis en lia koro, tio revenis. Tio venis al mi. Tio pelis min ĉiun tagon tien ĉi, en tiun ĉi ĉambron. Tio lernigis min pripensi. Tio alportis lumon al mi. Tio lernigis min preĝi, ne al la malforta, malgranda Manitou de la ruĝaj viroj, sed al la forta, senlima, eminenta Manitou de Old Shatterhand, kiu sole kapablas denove animi nin, liajn ruĝajn infanojn, pro ke ni estiĝu finfine, kion ni devis estiĝi, sed ne estiĝis. Hodiaŭ li estas tie ĉi, Old Shatterhand, al kiu mi estis rifuzinta mian domon kaj mian koron. Hodiaŭ mi amas lin. Hodiaŭ mi scias, ke mi kapablas nenion sen li, tute same, kiel la ruĝa raso ne kapablas ion sen la blanka. Estos li, kiu unuiĝas nin per amo, kvankam ni volas detruigi per malamo. Kaj dum ni —“

Li ĉesis meze en la frazo. Nia torĉo, kiun ni ne jam estis povintaj estingi, komencis kraketi tre laŭte. Ĝi ŝprucis fajrerojn. Ĝi eligis fumon, kiu iĝis flanke de mi el la malfermaĵo, kaj tuj estis flarata kaj vidata de la indianoj. Ili ĉiuj vidis al mi. Tatela-sata surprizigite ekstaris de sia seĝo. Tiel restis nenio plu al mi, sed grimpi el la termalfermaĵo.

„Old Shatterhand!“ li elvokis. „Old Shatterhand, pri kiu mi parolas!“

„Old Shatterhand! Ĉu estas li? Ĉu estas li?“ li estis demandata de la ĉefoj.

„Jes; estas li!“ li respondis. „Truo en la tero! Kien ĝi kondukas? De kie vi venas?“

Tiuj vortoj estis direktitaj al mi. Mi iris al li, tiris la mapon, kiun mi estis depreninta de la medicinistoj de la komanĉoj, el la poŝo, disfaldis ĝin, donis ĝin al li kaj respondis:

„Rigardu jen! Tiel vi vidos, de kie mi venas.“

Li vidis la superskribon, kaj li vidis la nombron, kiam li jam elvokis:

„El la sekreta biblioteko! La gravega mapo, kiu estis ŝtelita de unu el miaj prauloj! Kies ŝtelinton ni estis vane serĉintaj ĝis nun! Suspektata tiutempe estis la eksa medicinisto de la komanĉoj, kiu estis gasto tie ĉi plurajn semajnojn kaj ofte estis estinta en la biblioteko. Kaj nun Old Shatterhand alportas ĝin al mi! Kia miraklo, kia granda miraklo! De kiu vi ricevis ĝin?“

„De la pranepo de la ŝtelinto. Mi montros lin al vi.“

Sufiĉis voko de mi, kaj Intŝu-inta kaj la torĉoportanto venis grimpante supren al ni kaj alkondukis la du kaptitojn. Ili tuj estis rekonataj de la apaĉaj ĉefoj. Tiuj volis ekfari laŭtajn elvokojn de miriĝo, sed mi neigis tion per mansigno kaj diris mallaŭte:

„Silentu! Ili ne rajtas vidi kaj aŭdi, kie ili estas! Mi rakontos pli poste. Ĉu tie ĉi en la kastelo estas loko, kie eblas tenadi kaptitojn tiel, ke ili povas nek fuĝi nek esti vidataj de aliaj homoj?“

„Ni havas tre bonajn kaj tre sekurajn malliberejojn tie ĉi“, Tatela-sata respondis.

„Do Intŝu-inta konduku ilin tien kaj tiam revenu. Mi ankoraŭ bezonas lin.“

Tatela-sata donis al sia grandega servisto la necesajn ordonojn per mallaŭtigita voĉo, post kio tiu foriĝis kun la du medicinistoj kaj la torĉoportanto, por konduki ilin al la malliberejo. La pordo super la ŝtuparo estis malfermata, kaj la Koretinjo videbliĝis. Estis sukcesinta al ŝi foriĝi ĝustatempe. Nun, ke ŝi vidis tra la duonfermigita pordo, ke mi reĉeestis, ŝi pensis, ke ŝi rajtis sin lasi revidi. Oni povas pensi, ke tio ne malaltigis la miriĝon de la ĉefoj.

Mi rakontis al ili, kion mi pensis rakontende, ĉar mi volis fari neniun el ili mian kompletan ankaŭscianton de miaj opinioj kaj planoj. Ĵus kiam mi estis finiĝinta, Intŝu-

inta revenis. Li anoncis, ke la kaptitoj estis fikse enŝlositaj, kaj ke Pappermann kaj liaj akompanantoj estis alvenintaj de la akvofalo al la kastelo. Mi sciigis lin, ke li akompanu min nun unu fojon plu malsupren en la kavon, kaj pro tio alportigu du novajn torĉojn. La Koretinjo demandis, ĉu ŝi ankaŭ kunestu. Kiam mi neis tion, Tatela-sata petis al mi konfidi mian edzinon al si. Li ekspektis la viziton de Kolma-puŝi kaj estus tre ĝojante interkonatigi la du virinojn. Memkompreneble mi tute ne kontraŭis pri tio kaj grimpis, kiam Intŝu-inta venis kun la torĉoj, denove malsupren en la kavon kun li. Estu menciata, ke la dek du apaĉaj ĉefoj estis alvenintaj nur hodiaŭ dum nia neĉeesto tien ĉi, kaj starigintaj iliajn tendojn en la supurbo. Ili reprezentis ĉiujn apaĉajn tribojn, pri kiuj Tatela-sata povis fidi.

Mi havis mian tute specialan kaŭzon grimpi unu fojon plu malsupren en la kavon. Kiam mi nun foje estis ekkonanta lin, mi ankaŭ volis ekkoni ĝin rekte tute; ĉar estis malgranda parto, kiun mi ne jam konis. Mi memorigas, ke la vasta, laŭrajdebla vojo, kiu kondukiĝis de la ‚Valo de la Kavo‘ tra tiu, finiĝis supre malantaŭ la vuala falo en la liberon. Je la loko, kie ĝi estis maskita per stalaktitoj, kiujn ni estis forigitaj, deflankiĝis de ĝi malvasta vojo dekstren, kiu kondukis al la altaĵo nur por piedirantoj. Ĝian faktan finaĵon tiu malvasta vojo havis tute supre en la pasiflora ĉambro. Ĝis tie ni estis irinta laŭ ĝi. Sed jam malsupre en la kavo deflankiĝis de ĝi dua, malvasta vojo, preter kiu ni estis pasintaj, sen ke miaj akompanintoj estis rimarkintaj ion de ĝi. Nur al mi sole la loko estis evidentiĝinta, je kiu la kiel stalagmitoj uzitaj stalaktitoj indikis, ke ankaŭ tie ĉi ekse laŭirebla vojo estis barita kaj maskita per ŝtonoj. Al tiu loko ni nun reeniris. Mi estis kunpreninta nur Intŝu-inta:n, ĉar li estis la konfidulo de la medicinisto, ĉar la ek-trovo, kiun mi nun volis fari, estis tre konfidenca afero. Ĉar kiam mi interligis la super-terajn kaj subterajn lokaĵojn, tio rezultigis al mi la jenan: La vasta vojo finiĝis en la montovalo, malantaŭ la akvofalo. La inter ambaŭ situanta deflankiĝo de tiu malvasta vojo, kiun mi serĉis nun, do devis finiĝi inter la akvofalo kaj la kastelo. Kaj kiam mi demandis tiam, kiu loko nun estis plej taŭga pro tio, mia supozado ĉiam denove nur celis al la diablaj katedroj, aŭ, kiel ĝi estis nomita tie ĉi, al la ‚Orelo de la Diablo‘, kiun ni estis pasintaj, kiam la medicinisto estis montrinta al ni la vualan falon. Ĝustis en ĉiu rilato, ke tiu loko havis ligan al la sekreto plena, grandega kavo. Kiu scias, kiaj gravaj aferoj estis okaziĝintaj antaŭ jarmiloj tie ĉi supre kaj tie malsupre. Tial nun al mi, kiu esploris tiujn interrilatojn, estis tre grave fari tion laŭeble nerimarkite, kaj konfidigi neniun homon, kiu ne meritis tiun konfidon. Tiu estas la kaŭzo, kial mi estis kunpreninta nur la elprovitan, lojalan Intŝu-inta:n.

Kiam ni atingis la rilatan lokon, je kiu mi supozis deflankiĝon de la malvasta vojo, ni haltis pro esplori la sur la tero kuŝantajn ŝtonojn. Ankaŭ ili ne estis stalagmitoj, sed stalaktitoj, do ne evoluiĝintaj je tiu ĉi loko kaj ejo, sed alportitaj pro io ajn celo. Ni forigis tiom da ili, kiel necesis pro ricevi envideblon, kaj tie ektrovis nu fakte tre baldaŭ la malkaŝitan vojeton, kiu kondukiĝis supren malantaŭ ili. Mia supozado do ne estis erariginta min. Ankoraŭ nur estis la demando, kie ĝi finiĝis supre. Ni devis iri laŭ ĝi.

Ni unue ripozis kelkajn momentojn post la penado, kiun la flankenigo de la pezaj ŝtonoj estis kaŭzinta al ni. Dum tiu mallonga tempo estis silente, komplete silente

ĉirkaŭ ni, kaj tiel ni aŭdis stangan, kraketan brueton, kiu iĝis al ni el la foreco, verŝajne el la regiono, en kiu nia malvasta vojo deflankiĝis de la vasta. Kio estis tio, aŭ kiu estis tio? Ĉu iu troviĝis tie? Nia sekureco postulis ekkoni tion laŭeble rapide. Ni do levis la torĉojn kaj hastis al la direkto, el kiu la sono estis iĝinta al ni. Tie ni vidis, ke ne estis kaŭzita de ĉeesto de homoj, sed de malsupra dispecetiĝo de la plafona ŝtonejo, fakte ekzakte je la sama loko, je kiu mi estis sidinta kaj rimarkinta la fendeton super mi. Tiu ĉi fendeto nun estis pli vaste kaj pli grande ol antaŭe. Estis defalintaj tute konsiderindaj sintropecoj. Ĉiukaze io loziĝis tie supre. Ajn kiu volis pasi tie, tiu devis esti ekde nun gardiĝe. Tamen mi akceptis tiun personon tre indifere, ĉar mi havis eĉ ne la plej etan antaŭscion pri la fakta kaŭzo de tiu fenomeno.

Ni reeniris al la loko, je kiu ni estis okupiĝintaj, kaj de tie iris laŭ la nove ektrivita, malvasta flanko koridoro, kies finiĝon ni ne jam konis. La grandega Intŝu-inta estis mirigita.

„Estas, kvazaŭ vi estus Winnetou“, li diris. „Vi aŭdas ĉion; vi vidas ĉion! Sed ni, kiuj ekde ĉiam loĝas tie ĉi, aŭdas nenion, vidas nenion kaj trovas nenion! Vi estas kiel li, kaj li estis kiel vi!“

Ankaŭ tiu vojeto kondukis nin malsupren de kavo al kavo, sed multe pli krute ol la alia. Tiam estis homfaritaj ŝtupoj, kiuj estis ĉizelitaj en malmolan ŝtonon. Finfine ni staris je la finaĵo. Sed tiu finaĵo ne konsistis el pordo, muro, ŝtono, sed el sennombraj radikoj kaj radikeroj, kiuj kreskis el la tero, kiu estis tie ĉi ne el ŝtono, kaj kiuj iĝis antaŭen vere netraireble. Ni devis ekuzi la helpon de niaj tranĉiloj. Kaj ili helpis. Fortranĉante ĉion, kiu baris nian vojon, kaj ĵetante tion malantaŭen, ni antaŭeniĝis paŝon post paŝo, kaj fine ne plu staris antaŭ radikoj kaj lumevitaj volvokreskaĵoj, sed malantaŭ densa arbedo, tra kies branĉaro la lumo de la tago salutis nin. Ni estingiĝis la torĉojn.

La arbedo kreskis kune kun aliaj arbedajoj el ŝtonamaso, kiu ĉiukaze ne estis kreigi-inta nature, sed estis alportinta tien pro kaŝi la koridoron, el kiu ni venis. Dum ni trampis, ni klopodis lezi la branĉojn kaj branĉetojn laŭeble malmulte. Tiam ni staris — kie? Ĉe la maldekstra ‚Orela de la Diablo‘, do tute tiel, kiel mi estis supozinta; la dekstra orelo situis trans la veturovojo ĵus vidalvide.

„Uf, uf!“ Intŝu-inta diris. „Okazas mirakloj!“

„La retrovo de io tre maljuna aĵo ne estas miraklo“, mi respondis. „Ni troviĝas ĉe via Devil’s Pulpit.“

„Kies enigmon neniu homo povas malkaŝi!“

„Ĉu ne? Ĉu vere ne?“

„Ne. Eĉ Winnetou ne povis tion!“

„Do atendu! Eble estas vi, kiu povas!“

„Ĉu mi?“ li demandis mirigite. „Neeble!“

„Tute kaj plene ne neeble, sed eĉ tre verŝajne. Ĉu vi silentos, eĉ al Tatela-sata, almenaŭ intertempe?“

„Mi silentos!“ li asertis, ekspektoplene vidante al mi.

„Bone! Unue ni ĉirkaŭvidu! Ni grimpu supren, sur la ‚Orelon de la Diablon‘, pro ekkoni ĝiajn interrilataĵojn!“

Ni suprengrimpis. Kiam ni estis supre, mi troviĝis en preskaŭ la sama situo kaj en la samaj rilatoj kiel sur la unua Devil's Pulpit, kie la „Juna Aglo“ mortigis la urson kaj kie mi tiam interparolis kun la Koretino transe de katedro al katedro. Ekzistis ankaŭ tie ĉi du katedroj, ekzakte kiel tie. Kaj transe super la strato refoje estis du, kiu estis unu al la alia en tute la samaj dimensioj. Al supraĵa pensanto do tie ĉi ŝajne estis ne nur unu, sed du elipsoj, en kies fokuso oni povis aŭdi la mallaŭtan paroladon, fakte tiu unu ĉiflanke kaj la alia aliflanke de la veturvojo. Sed la pli akre pensanto ektrou jam je la unua vido, ke nek ĉi- nek aliflanke estis aparta, vera elipso, sed ke tia figuro nur formiĝis, kiam oni kunigis ambaŭ partaĵojn per liglinioj trans la veturvojo. Tiukaze tieis fakte granda duobla elipso kun kvar fokuso, ĉiflanke du kaj aliflanke du, je kies ĝusta uzado ebligis diversaj sonecaj eksperimentoj, kiuj devis ŝajni al la neinicinto kiel mirakloj.

Tion oni ekkonis, kiel dirite, jam je la unua vido. Sed tiu vido estis rapide deflankigita de ĝia objekto, fakte per treege okulfrapa ŝanĝo, kiu estis okaziginta ekde nia lasta tiesto en la ĉirkaŭa scenaĵo. Fakte la komencita Winnetou-statuo estis intertempe kreskinta, fakte en maniero, kiu komprenebligis al mi nur tiam, kiam mi vidis, kiel granda hodiaŭ estis la nombro de la ŝarĝoĉaroj, sur kiuj la pretigitaj kvadroj estis alportataj de la ŝtonminejoj, kaj kiel granda hodiaŭ estis la nombro de la laboristoj, kiuj estis okupigataj kunmeti tiujn kvadrojn al figuro kaj fiksigi ilin per jam antaŭboritaj feraj bobenstangoj, krampoj kaj boltoj. La figuro estis kreskinta jam ĝis suprakorpo; la artefarita roko, sur kiun ĝi devis apogi estis kreiganta, kaj la skafaldoj, sur kiuj devis labori la muntistoj, estis ekestintaj nur hodiaŭ, sed lasis ekspekti dimensiojn, kiuj iĝis al giganteco. Kiam Intŝu-inta vidis, ke mi koncentriĝis mian atenton nun pri tio, li diris:

„Ili laboras kvazaŭ en febro. Ili ne plu certas pri ilia afero. Ili vidas nun ĉiun tagon plie kaj plie, ke ne la tuta mondo konsentas pri ili. Tial tiu figuro estu pretigata laŭeble rapide, pro fari la impreson al la miloj da kunfestanoj, kiujn oni ekspektas, kiun ĝi laŭvole faru. Kiam mi antaŭe venis pro alporti la torĉojn, mi eksciis, ke oni firmanimigis labori nun tage kaj nokte pri la figuro, ĉar oni aŭdis, ke ankaŭ vi ĉeestas. Oni estis kredinta, ke oni povus facile ŝovi vin flanken.“

„Ha! Speciale certe *Mr. Oki-tŝin-tŝa*, nomata Antonius Paper, ĉu? Lasu lin ŝovi, lasu lin ŝovi! Sed ni nun reeniĝu al niaj nunaj devoj. Ja estis nia intenco provi, ĉu ne eble estas vi, kiu kapablas ektrou la sekreton de via Devil's Pulpit. Ni jen havas du katedrojn. Transe ankaŭ estas du. Ni troviĝas tie ĉi sur la unu; tie mi nun restas; sed vi iru transen, ankaŭ sur la unuan. Tie vi stariĝu kaj eldiras en tute normala sono dek nombrojn. Mi ne povos aŭdi tion tie ĉi flanke, sed tuj diros al vi la samajn nombrojn.“

„Ĉu diri al mi?“ li demandis. „Ĉu mi do aŭdos tion?“

„Jes.“

„Neeble!“

„Atendu tion! Nun iru! Sed faru tion diskrete! Diru al neniu, kien vi iras kaj kion vi volas fari tie!“

Li faris tre nekredeman vizaĝon kaj foriĝis. Mi vidis post li, sed sen videbligi min al la laboristoj kaj ĉaristoj, kiuj trafikis sur la veturvojo. Ili ne atentigis pri li. Li iris trans la vojo kaj grimpis sur la unuan katedron. Oni ja facile povas imagi, kiel scivoleme mi

estis, ĉu la eksperimento sukcesus. Mi aŭskultis. Jen, dank' al Dio, ili venis, la dek nombroj, fakte ĉiuj paraj laŭ la vico de du al dudek. Mi atendis nur momenton, tiam mi ripetis ilin same malrapide kaj klare, kiel li estis eldirinta ilin.

„Uf, uf!“ mi tiam aŭdis lin voki ekmirigite. „Ĉu vere estas vi, aŭ ĉu vi estas ne?“

„Estas mi“, mi respondis.

„Kaj vi aŭdis min, ĉu?“

„Tiel klare kiel vi nun min. Nun vi iru sur la alian katedron, la duan, kaj diru ion alian.“

„Kion?“

„Ajn ion. Vi eldiros demandon, kaj mi respondos al vi. Do, nun!“

„Bone, mi iras!“

Ankaŭ mi degrimpis de mia katedro kaj iris al la alia. Tie ne estis arbedaro, do mi rapide estis supre. Tiam mi aŭdis lin veni transe. Arbedoj bruetis, branĉoj krakis. Tiam li estis supre kaj demandis:

„Ĉu vi ankoraŭ estas tie? Ĉu vi aŭdas min?“

„Jes, mi aŭdas vin“, mi respondis al li, sed sen diri al li, ke mi intertempe ankaŭ estis ŝanĝinta mian lokon.

„Ĉu mi eble denove nombro?“

„Jes. Dek aliajn nombrojn.“

Li eldiris la malparajn nombrojn de tridek unu al kvardek naŭ, kaj mi ripetis ilin al li. Tiam mi lasis lin reeniri al la unua katedro, pro elparolu dek aliajn nombrojn plu. Mi vidis lin alveni transe. Li suprengrimpis. Ĉiukaze li nun nombris, sed mi aŭdis nenion. Nun mi sciis ĉion. Fakte estis duobla elipso. Oni povis aŭdi aŭ ne aŭdi, estis aŭdata aŭ ne esti vidata, tute kiel ĝi plaĉis al iu. Nur gravis la lokoj, kiujn oni elektis. Mi grimpis malsupren de mia katedro kaj iris al la veturvojo. Jen li vidis min kaj ankaŭ venis.

„Vi ne respondis je la lasta fojo“, li diris. „Aŭ ĉu mi misaŭdis vin? Kia miraklo, kia miraklo! Uf, uf! Trans tia fora distanco neniu homo povas kompreni la kutiman parolon, sed tamen mi komprenis vin! Kiel klarigeblas tio?“

„Pensu pri tio! Ja estas vi, kiu divenu la sekreton!“

„Vi ŝercas! Kial mi pene divenu, kion vi jam scias detale! Ĉar se vi ne scius tion, vi ne estus povinta irigi min al la ĝustaj lokoj. Ĉu mi eskcios tion?“

„Kiam Tatela-sata permesas, jes.“

„Sed nun mi diru nenion pri tio al li, ĉu?“

„Al neniu homo! Vi povus kaŭzi eĝan malfeliĉon, se vi sciigus tion al nur iu ajn. Nun venu supren al la kastelo; la suno jam malleviĝas!“

La ĉielo estis, ajn kiel for oni povis vidi tie ĉi en la valo, nuancita de ore travideblaj nubetoj. Diamanteca fajroflagro iĝis de la okzidento. Tio fulmis kaj brilis en la belega spegulo de la vuala falo. Kiel domaĝe, kiel ege domaĝe, ke la ĵus antaŭ la falo altiĝanta morta ŝtona figuro preskaŭ nebligis la ĝuadon de tiu beleco! Ni staris ĉe la kurbiĝo de la strato kaj de la valo, de kiu, venante de la supurbo, oni ekvidas la vualan falon la unuan fojon. Kaj nun tiu fatala figuro ĝenis al ni, tiu, kiu kontraŭe al la malpeza, nebula falo, ŝajnis tiel peze, tiel preme, tiel dolorige. La lignaj skafaldoj, kiuj altiĝis

antaŭ tiu falo, vere dolorigis la okulon, ankaŭ ĉar ŝajnis, ke oni starigis ĝin sen lodo. Ĝi estis klinita. Estis nur unu sola portilo, kiu staris vere orte. Tiun rimarkon mi faris nur iel flanke. Ĝi ŝajnis tute negrava al mi. Sed en la vico de la enmondaj okazoj ne ekzistas io plene sengrava aĵo; tion mi devis esti vidonta ankaŭ tie ĉi tre baldaŭ poste.

LA VERA WINNETOU

Ni nun iris al la kastelo. Intŝu-inta survoje estis tre silente. La rezulto de nia esplorado okupis lin interne. Alveninte supre ni disiĝis. Li iris al Tatela-sata, sed mi al mia loĝejo, kie mi supozis mian edzinon. Ŝi ankaŭ tieis, sed ne sole. Ambaŭ sidis flanke de la alia, tenante la manon de la alia. Kiam mi enpaŝis, ili ekstaris kaj venis renkonte al mi. Iliaj vizaĝoj havis la esprimon de profunda, serioza kortuŝiteco. La nomo Kolma-puŝi estas prenita el la mokvia dialekto. Ĝi signifas tiom kiel ‚Nigrokulo‘ aŭ ‚Malhelokulo‘. Per tia okulo, kiu ankoraŭ posedis ĝian brilon, mi tuj rekonis ŝin, kvankam ŝi estis ŝanĝiĝinta treege cetere. Ŝi estis eminente pli maljune ol mi. Ŝia eksatempe tiel fleksebla figuro nun kliniĝis. Ŝia grize brilantaj haroj estis metitaj en maldikiĝintaj plektaĵoj ĉirkaŭ la kapo. Ŝia tree maljuniĝinta vizaĝo konsistis el nuraj, etaj, unu al la alia dense estantaj faldetoj. Sed tamen ĝi estis bela, tiu vizaĝo. Ĝi posedis tiun de interne eligantan belecon, kiun oni nomas maljuneca beleco. Ĝi kutime estas la konsekvenco de multaj penoj kaj pensadoj. Tute memkompreneble Kolma-puŝi ne plu estis virece, sed virinece vestita. Ŝi restis starante antaŭ mi, vidis al mi longe, longe, ekzamene kaj tiam diris, dum ŝia serioza vizaĝo komencis rideti:

„Jes, estas li! Ankoraŭ tute kiel eksatempe! Malgraŭ la multaj, multaj jaroj, kiuj pasis, ekde ni vidis nin! Ĉu mi rajtas saluti Old Shatterhand-on?“

Ŝi demandis min tion, sen etendi la manon al mi. Mi respondis:

„Kiu kaŭzo povis ekzisti ne rajti tion?“

„La malamikeco.“

„Kiu malamikeco? Mi ne konas ian.“

„Ankaŭ mi ne estis koninta ĝin; sed nun mi ekkonis ĝin. Old Shatterhand estas, rilate al la monumento, nia kontraŭulo!“

„Eble kontraŭulo, sed tute neniel malamiko. Mi estis estiminta, admirinta kaj aminta Kolma-puŝi:n tiel longe kiel mi konis ŝin, kaj mi tenos tiun amikecon al ŝi tiel longe kiel mi vivos. Mi petas pri ŝia mano, kiu povis esti tiel riskeme kaj brave, sed tamen tiel indulge kaj tiel noble je la sama tempo.“

Ŝia vizaĝo estiĝis kiel hela, varma sunbrilo, kiu lumis el ĉiu faldeto supren al mi. Ni etendis la manojn unu al la alia. Mi tiris ŝin firme al mi kaj kisis ŝiajn karajn, bonajn, iame tiel profunde malgajaj okuloj. Tiam ni sidiĝis unu flanke de la alia pro daŭrigi la de mia veno interrompita parolado. Jen mi nun vidis kaj aŭdis, ke Kolma-puŝi dum la daŭro de la lastaj jardekoj estis lerninta multon, tre multon. Ŝi estis mencie kreskinta kun Young Surehand kaj Young Apanatŝka, iliaj nepoj, sed bedaŭrinde ne plie super la